der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund e. V./GDREA

26. Jahrgang Nr. 164 (6/1990) ISSN 0014-0619 2 DM

Pri Esperanto en GDR 1945–1990

Skizo de la historio de GDREA

0. Enkonduko

Dum ĉi tiu jaro, en 1990, la esperantistoj de la jam eksa Germana Demokratia Respubliko povus soleni la jubileon de 25-jara oficiala agado en Kulturligo. Pro la sociaj cirkonstancoj ili eble ne solenas. Sed la datreveno estas kaŭzo por retrorigardi. Pro la rapida (tro rapida) malapero de GDR ankaŭ malaperos „Esperanto-Asocio de GDR en Kulturligo". Ĉiukaze ni devas marki, aŭ almenaŭ fiksi la ĉefajn trajtojn, la ĉefajn atingojn de la Esperanto-movado en GDR. Tion ni simple ŝuldas al la multaj fervoraj esperantistoj, kiuj dum multaj jaroj obstine agadis por Esperanto. Tion ni ankaŭ ŝuldas al la pioniroj, kiuj post multe da kontraŭstaro ebligis la reoficialigon de la Esperanto-movado en GDR.

Tiu historia skizo necesas, por ke la esperantistoj el FRG konsciu, ke ili kuniĝos en la nova tutgermana Esperanto-movado kun kolegoj, kiuj agadis en relative forta kaj bone organizita movado, kiu ĝuis fortan subtenon kaj favorajn kondiĉojn. Do, la iamaj membroj de GDREA povas tute memfide rigardi la estontecon. La Esperanto-movado de GDR certe ne apartenis al tiuj sferoj, kie regis malsupereco kompare al la okcidento. Tion skribante ni ja konscias pri niaj mankoj, la ne atingitaj celoj k. s. Sed tio, kion ni atingis, estas io. Restas la granda demando, ĉu ni sukcesos iel transpreni tion en la estontecon? Aŭ ĉu pro la hasta evoluo al unuiĝo, pro la emo forĵeti ĉion ajn el la iama GDR, detruiĝos ankaŭ tio, kion ni kreis per nia movado? Ni ja volas enporti ion solidan en la estontecon. Eble pro tio estas tute necese, fiksi almenaŭ la esencon de nia agado.

Sincere dirite, la verkinto de ĉi tiu skizo ne estas tre feliĉa. Li mem ja tre kuninfluis la 25 jarojn de la organizita Esperanto-movado en GDR. Li lernis Esperanton jam en la jaro 1957. Li, siatempe junulo, kunagadis, kunesperis kaj eble ankaŭ iom kunhelpis la reoficialigon de Esperanto en GDR. De 1965–1968 li estis la prezidanto de la siatempa Distrikta Laborrondo Esperanto de *distrikto Rostock* kaj la prezidanto de la grupo en *Wismar*. Li gvidis kursojn, propagandis, skribis artikolojn, faris multajn prelegojn k. s. En 1968 li venis al Berlin kaj fariĝis tie la estro de la sekcio Esperanto. Ekde 1970 sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en (la siatempa) Germana Kulturligo, kaj ekde 1981 sekretario de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, same ekde 1970 redaktoro de „der esperantist". Do – tute evidente – la verkinto estas tro intime ligita al la temo kaj pro tio sendube subjektiva. Sed kion fari? Neniu alia verkus la skizon. El tio jam konkludeblas, ke la sekva skizo ne vere estas priskribo de la **historio** de la Esperanto-movado en GDR. Tiun historion necesas skribi alimetode. Tiun historion ne devas skribi koncernito sed historiisto. La skizo tamen klopodas prezenti la ĉefajn etapojn kaj atingojn, por tiel doni almenaŭ imagon pri la irita vojo. Ne multaj ankoraŭ vivas, kiuj aktive kuniris ĉi tiun vojon de 1945 ĝis hodiaŭ. En la ĝisnuna Centra Estraro de GDREA tiuj estas nur *Werner Habicht, Rudolf Hahlbohm* kaj *Ludwig Schödl*. Multaj veteranoj nin jam forlasis: *Otto Bäßler, Rudi Graetz, Erwin Schleusener, Erich Würker, Willi Zimmermann* k. a.

Ankoraŭ mankas prezento de la historio de Esperanto en la postmilita sovetie okupita zono kaj posta GDR. Ekzistas sufiĉe da materialo por verki almenaŭ komentitan dokumentaron. Pri la periodo de la neoficiala agado en GDR (1949–1965), kiu estis ofte ligita al subpremoj, *Erich Würker*[1] prelegis dum la 10-a LEA-renkontiĝo en 1987 en Zwickau kaj *Ludwig Schödl*[2] dum la 11-a LEA-renkontiĝo en 1988 en Bad Saarow. Do tiun neagrablan ĉapitron ni ne evitis. Ekde 1965 la ĉefajn aktivadojn sufiĉe detale dokumentas „der esperantist". Krom tio ankoraŭ ekzistas ĉiuj aktoj de la iama Centra Laborrondo Esperanto en Germana Kulturligo kaj (ekde 1981) de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Pri la sorto de la aktoj kaj dokumentoj sur distriktaj ebenoj ne eblas unuecaj juĝoj. Tamen, almenaŭ en la iamaj distriktaj sekretariejoj de Kulturligo, kaj aparte ĉe la iamaj Distriktaj Estraroj de GDREA devas troviĝi sufiĉe da materialo. Espereble la esperantistoj-aktivuloj transprenis kaj savis tiujn materialojn por povi skribi la regionan historion de la Esperanto-movado en GDR.

Kaj fine ni atentigu, ke jam aperis superrigardoj pri la plej grava enhavo de GDR-numeroj de „Paco" („de" 162/1990) kaj „der esperantist" (163/1990). Tiun materialon ankaŭ konsideru!

1. La 8 periodoj

Ni povas distingi 8 periodojn en la historio de la Esperanto-movado sur la teritorio de GDR. Tiu distingo estas subjektiva provo. Eblas ankaŭ aliaj distingoj, laŭ aliaj kriterioj. Jen ili:

1.1. 1945–1949: „La ekflagro"

Post la milito en ĉiuj okupitaj zonoj de Germanio reaperis Esperanto-grupoj kaj provoj refondi la germanan Esperanto-movadon, disbatitan unue de Hitler kaj poste suferigitan per la milito. En la sovetie okupita zono la ekflagro finiĝis en 1949 per malpermeso.

1.2. 1949–1965: „Subpremo kaj kontraŭstaro"

En GDR Esperanto ne estis dezirita. La lingvo estis kalumniita kaj organizita agado estis strikte malpermesita. Tamen, estis grandegaj klopodoj, venki la kontraŭstaron. Tiuj klopodoj, helpitaj per la finiĝo de la kruda stalinismo (Ĥruŝĉova periodo) kaj la reorganizado de la movado en la eŭropaj popoldemokratioj, finfine en la jaro 1965 havis sukceson. En la kadro de Germana Kulturligo fondiĝis la 31-an de marto „Centra Laborrondo de la Esperanto-amikoj" (CLE).

1.3. 1965–1970: „Strukturoj kaj unuaj sukcesoj"

Dum tiu periodo kreiĝis la distriktaj kaj subdistriktaj laborrondoj, solidiĝis la gvidantaroj, aperis la unuaj lerniloj, estis la unuaj atingoj. Ĉi-tiu periodo finiĝas per la 1-a Centra Renkontiĝo de la esperantistoj en Germana Kulturligo, kiu okazis la 26-an/27-an de septembro 1970 en Karl-Marx-Stadt.

1.4. 1970–1976: „Aliĝo al la internacia movado"

La esperantista movado de GDR pluelformis sian strukturon kaj siajn aktivecojn. Aperis i. a. la komponantoj LEA, interlingvistiko, beletro, kvalifikado, junulara agado. Kaj antaŭ ĉio establiĝis la internaciaj rilatoj, aparte al la orienteŭropaj landoj. Sed ankaŭ al MEM, TEJO kaj UEA nodiĝis fortaj rilatoj. La periodo finiĝis per la aliĝo de CLE al UEA kadre de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto, en la jaro 1976, en Ateno.

1.5. 1976–1981: „La movado fakiĝas kaj pliinternaciiĝas"

Pliprofundigo de ĉiuj ĝistiamaj aktivaj komponantoj. Krom tio aldoniĝas resp. pliprofundiĝas aparte la tuta gamo de faka agado: medicino, fervojo, komputado, interlingvistiko, metodiko. Aperas en la internacia gazetaro esperantista la nomoj *Bad Saarow* kaj *Ahrenshoop*, pro la altkvalitaj internaciaj fakaj seminarioj. Sed ankaŭ aperas la mallongigoj IFER, SEFT, IREBIK, ITRE por internaciaj aranĝoj en GDR. La 23-an de majo 1981 en Karl-Marx-Stadt fondiĝas „Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR" (= GDREA).

1.6. 1981–1987: „Stabiliĝo de la pozicio en la socio"

Tiu ĉi periodo estas karakterizita per pli kaj pli sistema praktika kaj faka agado. La amaskomunikiloj kutimiĝis aperigi informojn pri Esperanto. Multis radiointervjuoj. Aperis sciencaj libroj pri Esperanto. La kulmino sendube estis la *jubilea jaro 1987* kun multaj vere elstaraj atingoj. Esperanto apartenis al la bunta kultura pejzaĝo de GDR. Ekzistis multe pli da eblecoj por agadi por Esperanto ol la esperantistoj kapablis uzi ilin.

1.7. 1987–1990: „Serĉo de novaj vojoj – ekdubo pri la estonteco"

La asocio bone funkcias. Aldoniĝas novaj komponantoj. La junularo reaktiviĝas. Interlingvistiko donas fruktojn: pozicio en la altlernejoj. Koresponda kurso bonege funkcias. Kaj fine de 1989: la profundegaj skuoj en la socio de GDR. La Muro falis. Aperis tute novaj perspektivoj (vojaĝoj!), sed ankaŭ duboj kaj minacoj. La periodo finiĝas per la kunsido de la Centra Estraro de GDREA la 19-an de januaro 1990 en *Neubrandenburg*, dum kiu oni elektis novan prezidion de GDREA.

1.8. Januaro 1990-majo 1990(?): „Ĉu la estonto estas nia?"

La ŝanĝoj en GDR prenas evoludirekton, ĉe kies fino malaperas GDR. La tuta kelkmonata evoluo vekas esperojn kaj samtempe, tamen, pli kaj pli da duboj por la esperantistoj. Jes, estas novaj ŝancoj, sed la kulturaj institucioj de GDR disbatiĝas, aŭ, pro manko de subvencioj simple elsekiĝas. Ankaŭ Kulturligo estas en granda danĝero. Tia malgranda asocio kiel GDREA plene dependas de subvencioj, se ĝi volas plulabori en la kutima maniero. Kaj ĝuste tiu „kutima maniero" ne plu eblas. Finiĝis la „epoko de la senpageco kaj subvencioj". Ĉe la fino de ĉi tiu etapo estas la malapero de GDR kaj sekve, monatojn poste, ankaŭ de GDREA, kiu unuiĝos kun GEA. La **9-a etapo**, eventuale ekde la 69-a Germana Esperanto Kongreso, pentekoste 1991, por la iamaj GDR-esperantistoj jam estas tutgermana.

2. Skizo laŭ periodoj

Ni nun pli detale prezentos la unuopajn periodojn.

2.1. 1945–1949. De la militfino ĝis la malpermesa dekreto

Esperanto kaj ĝia movado estis fakte malpermesita en Soveta Unio, pli malpli draste ekde 1937[3]. En la jaro 1933 la nazioj malpermesis Germanan Laboristan Esperanto-Asocion (LEA), kaj en 1936 Germanan Esperanto-Asocion (GEA). La koncentrejoj englutis esperantistojn, la milito postulis siajn viktimojn. Do – neimageble malbonaj kondiĉoj por rekomenci post la fino de la Dua Mondmilito.

Kaj tamen ekestis kelkaj Esperanto-grupoj, i. a. en „Kulturligo por Demokratia Renovigo de Germanio" (la posta [Germana] Kulturligo [de GDR]), kiu fondiĝis en 1945. Aparte aktiva estis la grupo de *Erich Würker* en Reichenbach. Ankaŭ la junulara organizo „Libera Germana Junularo" (FDJ) ebligis kursojn, kiel i. a. raportis kaj per dokumentoj pruvis *Werner Habicht* el Waltershausen. Kompreneble plej ofte la esperantistoj renkontiĝis ekster tiuj tegmentoj. Oni organizis regionajn renkontiĝojn kaj partoprenis „zonajn" kaj „interzonajn" (do tutgermanajn) aranĝojn. En Hannover eldoniĝis „Komunikoj", informilo de la „Ligo de Germanaj Esperanto-grupoj", kie oni trovis informojn pri esperantistoj de la sovetie okupita zono. La 29-an de septembro 1946 en Dresden-Neustadt esperantistoj el 38 urboj fondis „Arbeitsgemeinschaft Deutscher Esperantisten in der Sowjetzone AES" (Laborsocieto de germanaj esperantistoj en la Sovetie Okupita Zono). Laŭ informoj de *Erich Würker*, tamen, jam dum majo 1947 la registaro de Saksio malpermesis la pluan agadon de la Esperanto-grupoj. Tiu malpermeso estas, tiel oni klarigis, sekvo de malpermeso flanke de la Sovetia Milita Administrejo de Germanio (SMAD). La esperantistoj retiriĝis en la privatan sferon kaj tenadis kontakton. La malpermeso ne estis senkontraŭdira, ĉar la menciitan malpermeson la registaro en Berlin nuligis dum februaro 1948. Do, ĉu eblis daŭrigi? Aperis denove gazetartikoloj. Tamen, la definitiva malpermeso venis en la jaro 1949 per jena dekreto:

„Ausführungsbestimmungen zur Verordnung zur Überführung von Volkskunstgruppen und volksbildenden Vereinen in die bestehenden Massenorganisationen" de la 12-a de januaro 1949. Tiu dekreto aperis en *„Zentralverordnungs-*

blatt", n-ro 7, (10.2.1949, p.68). En tiu dekreto ni i.a. legas sub 7. *„Oni devas nuligi grupojn de artefaritaj lingvoj", 8. „Lingvo-anguloj por Ido kaj Esperanto en gazetoj kaj revuoj estas nuligendaj senprokraste."*[4] La dekreto portas la subskribojn de *D-ro Fischer* („Präsident der Deutschen Verwaltung des Innern in der sowjetischen Besatzungszone"), kaj *Wandel* („Präsident der Deutschen Verwaltung für Volksbildung in der sowjetischen Besatzungszone"). La dekreto malebligis ĉiun ajn organizadon sed ne la kontaktadon inter la esperantistoj kaj la korespondadon. Per tiu tute klara kaj unusignifa dekreto finiĝas la unua periodo en la historio de la orientgermana Esperanto-movado.

2.2. 1949–1965: De la malpermeso ĝis plena reoficialigo

Dum ĉi tiu periodo la esperantistoj, nun en la nove fondita Germana Demokratia Respubliko, ne simple akceptis la malpermeson. Post la morto de *Stalin* (1953) en Sovetunio aperis kelkaj signaloj, kiuj montris, ke denove eblos engaĝi sin por Esperanto, kvankam unuavice nur en lingvistikaj medioj. Temas aparte pri studoj de *O.S. Afimanova/E.A. Bokarev* kaj *V.P. Grigorjev,* kiuj aperis en la prestiĝa sovetia lingvistika revuo „Voprosy jazykoznanija" (4/1956, 6/1956). Artikolo de *Bokarev* pri Esperanto aperis en la germanlingva revuo „Gazetaro de Sovetunio" („Presse der Sowjetunion", n-ro 95/1957), kiu aperadis en GDR. Ankaŭ en aliaj eŭropaj socialismaj landoj reaperis la Esperanto-movado. Tio kuraĝigis la esperantistojn en GDR, kiuj ja atente observis la evoluon en la aliaj landoj kaj tenis la kontakton kun la tieaj aktivuloj, ekz. kun *Burda* el ĈSSR. Oni devas sin demandi, kiajn argumentojn prezentis la kontraŭuloj de Esperanto? Ministeriaj oficistoj neakcepteble argumentis i.a., ke Esperanto ne estas vera lingvo, ĉar artefarita. La esperantismo – laŭ ili – estas reakcia kaj subtenas la kosmopolitismon, volante forigi naciajn lingvojn. Oni lernu „veran lingvon", precipe la rusan ktp. El la hodiaŭa perspektivo tiaj argumentoj ŝajnas tre ridindaj. Sed siatempe ili estis tre fortaj. La esperantistoj tamen batalis, per faktoj kaj raciaj argumentoj. Estis kelkaj grupoj, kiuj tre klopodis atingi oficialecon de la movado. Al ili apartenas la „suda grupo" i.a. kun *Erich Würker, prof. Georg Sörgel, Paul Glöckner, Curt Kessler, Walter Ranft, Alois Jauernig, Johann Haupt* por mencii nur kelkajn. En la „norda grupo" agadis i.a. *Ludwig Schödl, Karl Maier* kaj aliaj berlinanoj. Sed eble la distingo en du grupoj eĉ estas neĝusta. Ĉiukaze kunefikis kelkaj samtempaj klopodoj kaj personoj. Por la „suda grupo" gravan rolon ludis la sciencisto kaj nacipremiito *prof. Georg Sörgel* (kp. „de" 106/1981) kun siaj kontaktoj al la ministerio por klerigo. En la norda grupo agadis precipe *Ludwig Schödl*, direktoro de lernejo en Neuruppin kaj iama laborista esperantisto. Schödl sukcesis demonstri per sia praktika agado en la lernejo, ke Esperanto helpas starigi tre utilajn kontaktojn por la pacmovado. Lia lernejo en Neuruppin pro tio estis distingita per la titolo „lernejo de la paco". Li krome fariĝis membro de la Germana Packonsilantaro kaj pro tio havis multajn utilajn rilatojn al influhavaj personoj (kp. „GDR-Paco" 1989). La 15-an de marto 1959, laŭ iniciato de profesoro Georg Sörgel, kaj kun permeso de la ministerio pri popola klerigo, en Quedlinburg okazis renkontiĝo de 13 aktivuloj. Ili i.a. prezentis al la ministerio la proponon oficialigi la Esperanto-agadon en la kadro de Germana Kulturligo, kiu ja jam post 1945 donis sian tegmenton al kelkaj Esperanto-grupoj. La propono venis de *Erich Würker*, kiu – meritplena inventinto kaj fabrikdirektoro – estis membro de la Prezidia Konsilantaro de Kulturligo. Dum la sama jaro la Germana Packonsilantaro delegis oficialan grupon de 10 personoj al la 44-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Varsovio sub la patroneco de la pola ŝtatprezidanto *Jozef Cyrankiewicz*.

Krom la menciitaj klopodoj reoficialigi Esperanton per pintaj kontaktoj, petleteroj kaj proponoj al ministerioj kaj al la politburoo de la reginta partio (kaj tiuj leteroj ne ĉiam estis tre lertaj kaj saĝaj) pli kaj pli da esperantistoj inter si ligis fortajn kaj konstantajn kontaktojn, interŝanĝis materialojn kaj ricevis multon el eksterlando kaj el FRG. Ili organizis renkontiĝojn. Elformiĝis iom stabilaj grupoj. La aŭtoron, ekzemple, kiu konatiĝis kun Esperanto en 1958, tre influis tiuj kontaktoj, ekz. i.a. al *Ludwig Schödl* (Neuruppin), *Karl Maier* (Berlin), *Curt Kessler* (Dresden), *Robert Stoll* (Rostock). Li havis kontaktojn kun la studentoj *Emil Rechtziegler* (en GDR fariĝinta profesoro pri ekonomiko) kaj *Hans Eichhorn* (nun psikiatro). Aparte dankema li estas al *Franz Tischer* el Magdeburg, kiu disponigis al li multe da materialo kaj rigore korektis liajn unuajn esperantajn leterojn. Apartan influon inter junaj intelektuloj esperantistaj havis la studento de indonezistiko kaj sinologio en Leipzig, *Erich-Dieter Krause*, kiu arigis ĉirkaŭ si grupon da junaj entuziasmuloj. Tiu „Krause-klubo" jam havis siajn stabilajn rilatojn al la Foiroj de Leipzig, ĉar ofte inter la foiraj profesiuloj ankaŭ troviĝis esperantistoj. Multaj el tiu grupo poste aktiviĝis en la oficiala movado kaj donis valoran kontribuon al la evoluigo de la Esperanto-movado en GDR, inter ili *Rudolf Burmeister, Linde Heinze* (nun Knöschke), *Annelore Wilke* kaj, ne laste, *Dieter Krause* mem.

En 1960, do antaŭ la oficialigo de Esperanto en GDR kaj antaŭ la apero de la konata serio de GDR-eldonoj de „Paco", aperis la unua nacia numero de „Paco" en GDR. Ĝin redaktis *Ludwig Schödl* kaj *Karl Maier*. Eldonis la 10-paĝan numeron la *Germana Packonsilantaro*.

La 48-an Universalan Kongreson de Esperanto, 1963 en Sofio, ankaŭ partoprenis oficiala delegacio el GDR, subtenita de la Germana Packonsilantaro.

Ke ankaŭ multaj povis partopreni la kongreson private, ili grandparte dankas al *Hieronimus Stroinski* (Leipzig), kiu venkis por ili kelkajn financajn kaj vizajn barierojn.

La spertojn, kiujn la ambasado de GDR povis kolekti, en Sofio plifortigis a forton de la argumentoj. La insistaj klopodoj flanke de esperantistoj, aparte de iamaj membroj de GLEA, direktitaj al la Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (SED), finfine havis sukceson. Oni trovis la tegmenton por oficiala movado. Dum februaro 1965 la Prezidio de „Germana Kulturligo" decidis pri la fondo de „Centra Laborrondo de Esperanto-Amikoj" (CLE) kiel suborganizaĵo en Kulturligo. Germana Kulturligo estis organizaĵo, kiu fondiĝis jam en 1945 kiel organizaĵo de progresemaj antifaŝistaj intelektuloj, kiuj volis konstrui novan demokratan kulturon. Tiun celon la organizaĵo esprimis per sia unua nomo: „Kulturligo por la Demokratia Renovigo de Germanio". En 1958 la organizaĵo ŝanĝis sian nomon kaj fariĝis „Germana Kulturligo". Dum la jaro 1972 ĝi novnomiĝis „Kulturligo de GDR" kaj ekde marto 1990 nur „Kulturligo r.s." (r.s. = registrita socieo). Per tiu decido finiĝis la dua periodo de la priskribita historio. Esperanto fariĝis oficiale agnoskita en GDR. La organizita agado por Esperanto ne plu estis malpermesita. Kompreneble, tiu rezulto estas la frukto de multegaj klopodoj, post bataloj kaj malvenkoj, esperoj kaj seniluziiĝoj, kaj ni ne forgesu mencii, ke dum la tempo de 1949–1965 nemalmultaj esperantistoj devis suferi premojn pro siaj esperantisteco kaj klopodoj akceptigi Esperanton en GDR. Ankaŭ okazis, ke membroj de la reganta partio estis eksigitaj nur pro tio, ĉar ili defendis Esperanton. La verkinto mem, kiu en 1963 estis sur

la oficiala listo de la delegitoj de la Germana Packonsilantaro por la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, estis forstrekita pro protesta letero, sendita de li al la dogano, kiu estis konfiskinta esperantaĵojn. Aliaj esperantistoj troviĝis sub observo de la sekurecservo aŭ devis suferi iujn premojn. Pri tiu malagrabla tempo mankas sufiĉe da dokumentitaj faktoj. La aŭtoro volonte kolektas ĉi-rilatajn memoraĵojn, deklarojn kaj, precipe, aŭtentikajn dokumentojn.

2.3. 1965–1970: De la unuaj oficialaj paŝoj ĝis la 1-a Centra Renkontiĝo

La 31-an de marto 1965 la menciita Centra Laborrondo fondiĝis. Elektiĝis prezidanto komerca konsilisto *Rudi Graetz*, kiu ĝis 1964 estis la gvidanto de la komerca reprezentejo de GDR en Danio. Dum la 50-aj jaroj li gvidis la komercan reprezentejon de GDR en Islando. Ĉar nek en Islando nek en Danio GDR havis ambasadejojn, *Graetz* estis la plej altranga diplomato de GDR en la menciitaj landoj. Dum la dudekaj jaroj ĝis la malpermeso de GLEA en 1933 *Graetz* estis aktiva laborista esperantisto kaj gvidis la organizaĵon de Mecklenburg (pri *Graetz* vidu „de" 83/1977, 144/1987). Vicprezidanto de CLE fariĝis *Willy Vildebrand,* kiu de 1930–1933 estis la prezidanto de *Germana Laborista Esperanto-Asocio* (GLEA) kaj redaktoro de „Arbeiter-Esperantist". Sekretario fariĝis *Eugen Menger,* neesperantisto.

Menger apartenis al la aparato de la Kulturliga Centra Oficejo kaj estis la estro de la sekcio Esperanto en Kulturligo. Fakte *Menger* unue devis enlaboriĝi en la esperantistan medion. Nekonante la lingvon li certe ne estis ideala sekretario de CLE. Tamen, li estis honesta kaj pli kaj pli li konvinkiĝis pri la fascineco de Esperanto kaj helpis laŭ siaj fortoj. Tre grava estis la fakto, ke li – malsame al multaj aktivaj esperantistoj – tre bone konis la burokratajn necesaĵojn kaj regulojn, kiujn oni devas observi por akceptigi iujn decidojn. Li do donis valorajn konsilojn, por superi diversajn barilojn. Al CLE ankaŭ aperis la tre fama laborista esperantisto el Leipzig, *Otto Bäßler,* kiu dum la dudekaj jaroj estis unu el la ĉefaj motoroj de GLEA entute („de" 81/1977). Krome al la gvidorgano apartenis *Helmut Fuchs, Rudolf Hahlbohm, Erwin Schleusener, Ludwig Schödl, Wilhelm Zimmermann* kaj la junuloj *Hans Eichhorn* kaj *d-ro Emil Rechtziegler*. Krom la junuloj ĉiuj aktivis en GLEA. *Fuchs* estis enkarcerigita de la nazioj en la Fortikaĵo Königsstein. *Hahlbohm* dum la 20-aj jaroj travagis Eŭropon, ankaŭ helpe de Esperanto. Li estis la posteulo de *Graetz* ekde 1977 („de" 99/1980). *Zimmermann* dum la 20-aj jaroj havis tre fortajn ligojn al sovetiaj esperantistoj, kaj eĉ laboris kelkajn monatojn en Sovetunio dum tiu tempo. *Schleusener* post la potencakiro de la faŝistoj agadis en (cetere en GDR ne akceptita) kontraŭfaŝista rezisto-grupo, kiu ekevoluis el la iama GLEA-grupo[5]. *Schödl* ne nur estis aktiva por la reoficialigo de la movado, kion ni jam menciis, li ankaŭ estis tre aktiva laborista esperantisto dum la dudekaj/tridekaj jaroj. La geedza paro *Alice* kaj *Ludwig Schödl* i. a. aktivis en „Interessengemeinschaft für Arbeiterkultur" (IfA), proletara antaŭulo de Kulturligo (kp. „de" 61–62/1973) kaj ekde 1933 pretigis kaŝinformilojn (Tarnschriften) en Esperanto por informi la eksterlandajn esperantistojn pri la naziismo (kp. „Nivea" en „de" 50/1971). *Hans Eichhorn* estis studento de medicino kaj *Emil Rechtziegler* juna doktoro de la ekonomiko. Do – evidente la unua gvidantaro de la Esperanto-movado estis sufiĉe homogena kaj bona partnero al la sendube ankoraŭ suspektemaj ŝtataj organoj kaj instancoj.

Tamen, ni tute ne volas kaŝi, ke ne al ĉiuj plaĉis la konsisto de la gvidorgano. Ja ekzistis inter la aktivuloj antaŭ la oficialiĝo diversaj imagoj pri tio, kiu devus fariĝi prezidanto kaj kiu eniru la gvidorganon. Sed kiel kutime, neniam oni povas kontentigi ĉies bezonojn kaj dezirojn.

La oficejo troviĝis en Charlottenstraße 60. CLE havis pagitan oficiston kaj tajpistinon, kiu estis *Ilse Serowy*. Do, tiu CLE ne estis organizaĵo en Kulturligo sed gvidantaro, kiu gvidis la distriktajn laborrondojn. Tiuj siavice gvidis la subdistriktajn laborrondojn. Kaj ili gvidis la grupojn. La tuta „karno" ĉirkaŭ tiu gvidstrukturo estas nomebla „La esperantistaro en Germana Kulturligo". Do – evidente, la esperantistoj funkciis kiel organizaĵo, kvankam ne nomanta sin „asocio". La unuaj bazaj dokumentoj estis decido de CLE „Maßnahmeplan der Esperanto-Freunde im Deutschen Kulturbund" kaj „Richtlinien für die Tätigkeit der Esperantofreunde im Deutschen Kulturbund" (vd. „de" 1/2 1965), do „Gvidlinioj" por CLE. En tiu „Maßnahmeplan..." (t. e. plano de farendaĵoj) oni i. a. fiksis la strukturon de la esperantista organizaĵo, menciis kiel estontan taskon la starigon de internaciaj rilatoj, sendon de delegacioj al internaciaj aranĝoj, la eldonadon de revueto, importon de Esperanto-literaturo, eldonon de vortaroj. Tiujn taskojn oni baldaŭ plenumis, escepte de importado de Esperanto-literaturo. Tio pro valutomanko ne okazis. En la „Gvidlinioj por la agado de la Esperanto-amikoj en Germana Kulturligo" („de" 1/2 1965) oni trovis ankoraŭ pli precizan formuladon de la taskoj:

1. Esperanto servu por pacaj kaj amikaj rilatoj inter la popoloj, aparte inter la „socialismaj landoj" kaj kun personoj „progresemaj el kapitalismaj landoj".
2. La esperantistoj de GDR prezentu al la eksterlando la atingojn de GDR.
3. Esperanto servu al la „ĉiuflanka klerigo de socialismaj personecoj".
4. La esperantistoj de GDR rigardu sian landon nacia kaj sociala modelo por la germana estonteco. Ili subtenu la konstruadon de socialismo.
5. Ili konsideru la progresemajn tradiciojn de la germana laborista Esperanto-movado.
6. Krom la menciitaj „Gvidlinioj" la statuto de Germana Kulturligo kaj ties decidoj estis la bazo por la agado de la esperantistoj de GDR.

Tiu taskaro, kvankam el hodiaŭa perspektivo certe kritikebla, respondis al la tiama situacio. Lige al la ŝanĝiĝinta interna (do GDR-a) kaj internacia politika situacio ankaŭ ŝanĝiĝis la laborprincipoj, taskoj kaj eblecoj por la agado de la esperantistoj. Dum la sekva tempo oni dufoje ŝanĝis tiujn „Gvidliniojn" kaj adaptis ilin al la ŝanĝintaj bezonoj kaj atingita evoluŝtupo de la esperantista agado en GDR. La dua versio de la „Gvidlinioj" estis akceptita de la 1-a Centra Konferenco de la esperantistoj de GDR 1972 (kp. „de" 54/1972 kaj 57/1973). La tria versio estis akceptita de la landa konferenco de GDREA en 1981, en Karl-Marx-Stadt (kp. „de" 108 + 109/1981). La dua kaj tria versioj aldonis novajn elementojn ne menciitajn en la „praaj Gvidlinioj" de 1965. La dua versio entenis:

- aktiva batalo kontraŭ imperiismo kaj por paca kunekzistado
- varbado de novaj adeptoj de Esperanto kaj organizado de la lernado de Esperanto
- internacia kunlaboro en fakaj rilatoj
- engaĝiĝo por MEM
- esplorado de la laborista Esperanto-movado
- pliriĉigo de la spirita kultura vivo pere de Esperanto
- plialtigo de la fakaj scioj kaj lingva nivelo de ĉiu esperantisto

– akcelado de individua kaj kolektiva korespondoj
– organizado de internaciaj aranĝoj en GDR.

Kaj la Gvidprincipoj de GDREA, akceptitaj en 1981, aldonis jenajn elementojn:

– la fondo mem de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR
– lernado, aplikado kaj kulturado de Esperanto kiel parto de la fremdlingva klereco en GDR
– membreco en neŝtataj internaciaj organizaĵoj
– fruktuzo kaj kulturado de la humanismaj tradicioj de la internacia Esperanto-movado, aparte (sed ne nur!) de la laborista Esperanto-movado
– sekvado de la evoluo de la sciencaj aspektoj de „Esperanto kiel internacia komunikilo sub la kondiĉoj de la scienc-teknika revolucio" donante „proprajn kontribuojn"
– kunlaboro kun sciencaj institucioj
– aplikado de Esperanto en scienco, tekniko kaj aliaj fakokampoj
– kunlaboro „kun aliaj fakoj de Kulturligo kaj kun aliaj sociaj institucioj kaj organizaĵoj de GDR"
– fikso de la demokratiaj strukturoj kaj proceduroj (Centra Konferenco, Centra Estraro, Distriktaj kaj Subdistriktaj estraroj, balotoj k.s.)

Tiom kiel ekskurso pri la „Gvidlinioj" kaj iliaj ŝanĝiĝoj.

Ni revenu al la jaro 1965.

La unua numero de „der esperantist" do aperis tuj post la fondo de CLE, en 1965 kiel septembra/oktobra. Ĉitiu numero, en kiu vi legas la historian skizon, estas la 164-a. (Ekde n-ro 42/1970 ĝin redaktis *D. Blanke).* Do aperis, kune kun la germanlingva eksterseria kajero en 1987, sume 3960 A5-formataj paĝoj. Kiel montras la bibliografio en „de" 163 (1990) (nur ĝis n-ro 158), tio estas grandega akumulita materialo. Alia rimarkinda starto estas menciinda: la 11-an de aprilo 1965 en la taggazeto „Der Morgen" (La Mateno) aperis la unua kontribuo pri Esperanto en serio, kiu ĝis nun seninterrompe aperadas. Ĝin fondis *Paul Lindner* (PALI), bofrato de Ehm Welk, kiu gvidis la serion ĝis n-ro 185. Ekde 186 (1969) ĝin transprenis *Peter Levsen* (= *D. Blanke*), kiu gvidas la serion ĝis nun. La serio ĝis n-ro 185 aperis regule ĉiun dimanĉon. Post tio ĉiun duan semajnon (foje ĵaŭde, foje vendrede, lastatempe en la semajnfina eldono). Kiel lasta numero en la serio (ĝis redakta fino de ĉi tiu numero) aperis la 703-a n-ro. Verŝajne movada rekordo. „La Mateno" aperis en eldonkvanto de 40.000–60.000 ekzempleroj. La unua oficiala delegitaro de la nove fondita CLE partoprenis dum julio 1965 la Eŭropan Esperanto-Konferencon en Vieno („de" 1/2 1965). Kaj la 8-an de septembro 1965 okazis la unua oficiala internacia esperantista foira renkontiĝo, el kiu pli poste, dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj, evoluis la konata IFER-serio.

La 51-an Universalan Kongreson de Esperanto en 1966 en Budapeŝto partoprenis la unua oficiala delegitaro de CLE. Bedaŭrinde la starto de la delegitaro estis malbona. La ambasadoro de GDR *Meißner* (dojeno) estis malĝuste konsilita kaj faris dum la inaŭguro tre malkonvenan politikan paroladon, kiu ne konformis al la neŭtraleco de UEA, la akra reago de la siatempa prezidanto de UEA, *prof. Ivo Lapenna,* estis komprenebla. CLE lernis el tio kaj estonte pli bone respektis la neŭtralecon de UEA. Oficialaj delegacioj partoprenis ekde 1969 ĉiujn kongresojn, kun escepto de la sekvaj: 57-a (Portland/Usono), 66-a (Brazilio/Brazilo), 69-a (Vankuvero/Kanado), 75-a (Havano/Kubo). Dum la unuaj jaroj oficiale partoprenis 3, poste nur 2 kaj foje eĉ nur 1 persono la universalajn kongresojn. Pro la funkcioj kaj la membreco en la Komitato de UEA tio ĉiam estis la prezidanto kaj la sekretario (aŭ unu el ambaŭ) kaj foje ankaŭ la prezidanto de la junulara sekcio. Se la kongresoj okazis en orienteŭropaj landoj, tiam ankaŭ partoprenis multaj privatuloj. La limigoj por privatuloj vojaĝi al okcidentaj landoj estis bedaŭrinda fakto. Feliĉe tiuj vojaĝlimigoj fine de 1989 falis, kaj estonte multaj esperantistoj el la iama GDR partoprenos la kongresojn kaj aliajn aranĝojn en la t.n. „okcidentaj landoj", eĉ pro tio, ĉar ili nun mem loĝas en tia „okcidenta" lando.

En la jaro 1966 aperis la unua eldono de „Paco" en la internacie konata GDR-a vestaĵo. Sur bona papero presita, ĝis 1989 aperis entute 24 kajeroj kun sume 944 paĝoj (pri la enhavo vidu „de" 162/1990). En la jaro 1967 aperis la unua lernolibro eldonita en GDR.

Ĝin verkis *Ludwig Schödl* („Wir lernen Esperanto sprechen", Leipzig: Enzyklopädieverlag 1967). Antaŭe oni lernis laŭ lernolibro de *Fritz Hegewald* el la dudekaj jaroj, de kiu oni estis trovinta ĉ. 3000 ekz. La lernolibro de *Schödl* estis represita de CLE en la jaro 1975 en koncizigita formo. Samjare aperis la poŝvortaro de *Erich-Dieter Krause* „Esperanto-Germana", de kiu ĝis 1990 aperis entute 6 eldonoj. La unua iom grava internacia Esperanto-konferenco, kiu okazis en GDR, estis tiu en la kadro de la „Baltmara Semajno" (9-a ĝis 11-a de julio 1967). Ĝin i.a. partoprenis *Evgenij Bokarev* kaj *Sergej N. Podkaminer.* Famiĝis ankaŭ la prelego de *prof. Viktor Falkenhahn* (vd. „de" 18/19 1967). La konferencon organizis *D. Blanke,* kiu siatempe estis prezidanto de la Distrikta Laborrondo Esperanto Rostock. Menciindas por la sama jaro la granda nacia jubilea filatelista ekspozicio en Karl-Marx-Stadt sub la temo „50 jaroj Ruĝa Oktobro" (6-a ĝis 15-a de oktobro), kiu entenis bonan esperantan ekspozicion de *Rudolf Burmeister,* elstara esperantisto-filatelisto. Aperis la unua porokaza poŝtstampo. En la sekvaj jaroj aperis multaj pluaj. Sub la rubriko „filatelo" en „der esperantist" la plej multaj estas menciitaj.

En la jaro 1968 en la feriejo kaj kvalifikejo de Kulturligo en Oybin okazis la unua seminario por aktivuloj de Esperanto-grupoj kaj estraroj, kiu per tio komencis tutan serion („de" 22/23/1968). Ĝin gvidis *D. Blanke.* De tiaj seminarioj ĝis 1989 okazis pli ol 50. Ĉiuj ne nur estis senpagaj, oni aldone al tio eĉ repagis la vojaĝkostojn kaj la seminarianoj ricevis de la entreprenoj pagitan forpermeson. Nuntempe ne plu ebla! Dum tiuj unusemajnaj aŭ 4-tagaj seminarioj estis prezentitaj fakaj prelegoj (pri la internacia Esperanto-movado, pri la GDR-a movado, metodiko de la Esperanto-instruado, lingvaj demandoj k.s.), sed ankaŭ prelegoj pri aktualaj internaciaj kaj aliaj problemoj.

Nur malmultaj scias, ke en GDR ankaŭ aperis la kajeroj de brajla gazeto en Esperanto, „Amikeco" („de" 25/1968), kiujn redaktis la blindulo *Günter Heil* kaj *Otto Bäßler,* ambaŭ el Leipzig. „Amikeco" aperis ekde 1971–1974 kvaronjare. Ankaŭ la lernolibro de *Schödl,* la vortaro Esperanto-Germana de *Krause* kaj malgranda Esperantokurso de *Paul Lindner* (el „Der Morgen") estis eldonitaj brajle de la Germana Centra Biblioteko por Blinduloj en Leipzig („de" 52/1972). Lige al tiu bonega iniciato CLE subskribis en 1970 kontrakton kun la prezidio de la Asocioj de Blinduloj pri kunlaboro. Bedaŭrinde, pro subjektivaj kialoj, tiu kontrakto neniam portis fruktojn kaj post retiriĝo de *Günter Heil* el CLE estis forgesita. Jam en 1968 okazis la unua kunsido de interesitoj pri la historio de la laborista Esperanto-movado. La esploroj pri tiu kampo fariĝis tre grava strategia komponanto en la agado de CLE/GDREA. Aperis studoj. Ĝis 1990 okazis 12 renkontiĝoj de iamaj LEA-anoj. Oni povis kolekti multege da materialo. La esploroj ja tre klare montris, ke Esperanto estas nek „reakcia" nek „pro-

gresema" lingvo. Sed simple lingvo, kiu povas ludi difinitan rolon, depende de la sociaj fortoj uzantaj ĝin. Kaj ke en la Esperanto-movado eĉ estis forta proleta tradicia linio, ne estis ignoreble, eĉ ne flanke de la ja sufiĉaj kontraŭuloj de la lingvo. Pri la tuta ĉi-rilata agado, tute kontinue farita tra la jaroj, ni publikigis superrigardon (vd. „de" 160/1990).

Cetere, retrorigardante al tiu agado, oni devas agnoski certan unuflankecon en du direktoj: La interpreto de la historio okazis surbaze de GLEA mem, en kiu ludis fortan rolon komunistoj, kaj surbaze de la analizoj de *E. K. Drezen, G. Demidjuk* kaj aliaj sovetiaj aktivuloj de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU).

Hodiaŭ ni scias, ke SEU troviĝis sub forta stalinisma premo, kio i. a. kondukis al problemoj kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), pri kiuj ŝajne SAT malpli kulpas ol ni supozis kaj en niaj studoj prezentis. La dua unuflankeco estas en tio, ke la tradicioj de la „burĝa" aŭ neŭtrala Esperanto-movado estis aŭ entute ne aŭ nesufiĉe konsideritaj. Tio ŝuldiĝas, krom al certa ignoremo al tiuj ja same valoraj tradicioj, ankaŭ al la faktoj, ke GLEA troviĝis en tradicia linio de la ŝtato kaj ke pri ĝi ekzistas pli da materialo. Krome, laŭ ni, la historio de la proleta Esperanto-movado estas pli dinamisma ol tiu de la neŭtrala movado. Kaj plua kialo estis la aktiva agado de iamaj membroj de GLEA en la nove establita Esperanto-movado de GDR. Kaj laste, la malmultaj homoj, okupiĝintaj pri historiaj temoj, devis koncentri siajn fortojn.

Fine de 1968 ankaŭ fondiĝis la Junulara Komisiono de CLE sub la gvido de *Hans Eichhorn*. La junulara agado ekde tio estis konstanta komponanto, kvankam ĉiam ne sufiĉa. La prezidantoj de la Junulara Komisiono post *Hans Eichhorn* estis *Rita Krips, Michael Lennartz, Detlef Kraus* kaj *Torsten Bendias*. Per la fondo de memstara junulara esperantista organizaĵo en 1990 („La Esperanto-Junularo [GDR]") finiĝis la periodo de la Junulara Komisiono. La menciitaj kaj aliaj junuloj poste estis komitatanoj de TEJO kaj *Eichhorn* eĉ fariĝis vicprezidanto de TEJO. La JK eldonis „Junularan Cirkuleron", kiun necesus trarigardi por verki la historion de la junulara Esperanto-movado en GDR. Fojfoje, ne tre ofte, en „der esperantist" aperis „Junulara Paĝo". Sed ni revenu al la jaro 1968. Komence ĝis meze de 1968 *Raimund Knapp* (nask. 1931) anstataŭis *Eugen Menger* en la funkcio de la sekretario de CLE, ĉar Menger estis malsana kaj krome necesis sekretario kun Esperanta lingvo-scio. Ekde la 1-a de aŭgusto samjare eklaboris la instruisto *Detlev Blanke* (nask. 1941) kaj anstataŭis *Raimund Knapp*.

Blanke en 1969 fariĝis la sekretario de CLE kaj de la posta GDREA. Aparte grava komponanto por CLE estis la agado kadre de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Tiu agado ne nur estis grava en si mem, ĝi ankaŭ klare dokumentis la kontribuon de la esperantistoj por sociutila agado, do por la paco. La ekzisto de MEM estis tre grava argumento por la pluevoluigado de la Esperanto-movado en GDR. Al la plej aktivaj funkciuloj de MEM siatempe apartenis ties fondinto *Anton Balagué* (hispano-batalinto kontraŭ Franko), *Wiliam Gilbert* (Francio), *Thomaš Balda* (ĈSSR), *Konstantin Gusev* (USSR), *Lajos Marton* (Hungario), *Nikola Aleksiev* (Bulgario) kaj *Leń Koźeniak* (Pollando).

Gravan eblecon, montri al la funkciuloj de Kulturligo la signifon MEM, donis la „Monda Asembleo por la Paco", de 21-a ĝis 24-a de junio 1969 en Berlin. Ĝin tute samrajte kiel aliaj internaciaj organizaĵoj partoprenis *Aleksiev, Balagué, Balda, Gilbert, Graetz, Gusev, Koźeniak* kaj *Marten*, partatempe ankaŭ *Blanke* („de" 34/35 1969). Ankaŭ estonte la MEM-agado estis tre grava komponanto por CLE/GDREA. Ties delegitoj aktive partoprenis multajn MEM-aranĝojn kaj kunlaboris en la gvidinstancoj de MEM. CLE/GDREA, kiel jam menciite, eldonis la ĉiujaran bultenon „Paco", kaj per la 24 kajeroj aperigis verŝajne la plej multajn *naciajn numerojn*.

Laŭ la „Gvidlinioj" por la agado de la esperantistoj de GDR tre grava tasko estis la utiligo de la lingvo por la internacia informado pri GDR. Tio iom, sed ne tro, amplekse okazis per diversaj publicaĵoj kaj per filmoj.

Jam en la jaro 1967 aperis la unua broŝuro: „La germana popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj", 63 paĝoj. Tio estis parolado de *Walter Ulbricht* okaze de lia peto al la Unuiĝintaj Nacioj por akcepti GDR kiel membron. La broŝuron eldonis „Verlag Zeit im Bild" en Dresden. Tiu modesta broŝuro aperis en kvanto de 2000 ekzempleroj. Vere impona materialo nur aperis en 1969. Tio estis la 256 paĝa kolore ilustrita libro „Germana Demokratia Respubliko – bildoj kaj faktoj" (Dresden: Verlag Zeit im Bild). La libreto estis traduktita de kolektivo sub gvido de *Raimund Knapp* kaj aperis en eldonkvanto de 20000 (!). La larĝa senpaga dissendo en pli ol 60 landojn rezultigis tre multflankan kaj interesan eĥon kaj leterojn de multaj esperantistoj. La eĥo estis precipe pozitiva. Sed ne mankis kritikaj voĉoj pri GDR. Kvankam la laŭ tiu eĥo farita tre interesa analizo estis transdonita al la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj kaj sekve ekzistis motivita espero, regule eldonadi similajn materialojn, tio fakte neniam sukcesis. Esperanto ne estis konsiderata tiom grava por enigi ĝin en la fremdlingvan informplanon de la ministerio. Krome kreskis la por GDR ŝtatotipa papermanko. Tamen, ankoraŭ aperis jenaj du broŝuroj: *Wolfgang Reischock:* „Klereco por hodiaŭ kaj morgaŭ" (Dresden: sama eldonejo kiel supre, 1970, 67 p.) La broŝuro prezentis la popolklerigan sistemon de GDR kaj aperis en kvanto de 5000 ekzempl. Kaj en 1972, unu jaron antaŭ la „Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj" en Berlin, aperis la ilustrita 63-paĝa broŝuro „Junularo", en eldonkvanto de 3000 ekzempl. Ankaŭ tiuj broŝuroj estis larĝe dissenditaj. Poste eldoniĝis nur 2 koloraj 24-paĝaj prospektoj pri GDR („Germana Demokratia Respubliko. Gravaj koncizaj informoj"). Tio estis la plej gravaj materialoj. Ankoraŭ mencieblas ilustritaj broŝuroj pri la koncentrejoj Buchenwald kaj Sachsenhausen, pri Potsdam-Sanssouci (tre bela) kaj la memorejo pri Ernst Thälmann en Ziegenhals ĉe Berlin. La esperantistoj en Leipzig sukcesis atingi, ke la „konstanta agrikultura ekspozicio de GDR" (agra) en Leipzig eldonis 2 afiŝojn, unu faldfolion pri naturprotektado en GDR kaj du broŝurojn pri tiu ekspozicio. Aliaj distriktoj atingis la eldonon de parte tre belaj koloraj prospektoj, ekz. Rostock, plue Schwerin, Suhl (ĝardeno Oberhof), Karl-Marx-Stadt, Magdeburg.

En 1969 ankaŭ estis sinkronizita la unua informa filmo pri GDR en Esperanto: „20 jaroj GDR". Ĝin sinkronizis *D. Blanke*. Komence de la 70-aj jaroj estis sinkronizitaj ankaŭ jenaj filmoj: „Nia lando" (*D. Blanke*), „4 ĉapitroj GDR" (*D. Blanke*), „Hieraŭ ni ankoraŭ estis infanoj" (*Rudi Graetz, Hans Eichhorn, Renate Berndt, D. Blanke*). Ĉi tiuj filmoj ekzistas en filmaj larĝoj 16 mm kaj 35 mm kaj intertempe krome kiel vidbendoj.

En la jaro 1970 fondiĝis strategie tre grava institucieto de CLE: la fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio. Ĝia prezidanto elektiĝis la en GDR konata slavisto (polonisto kaj litovisto) *prof. d-ro Viktor Falkenhahn* („de" 43/1970). La celo de la fakgrupo estis, kolekti sciencan materialon pri interlingvistiko kaj esperantologio, verki studojn por publikigo, ekspertizi, fari prelegojn, do – koncize dirite – fariĝi agnoskata partnero por la oficialaj sciencaj instancoj kaj altlernejoj de GDR.

Kiel ni montris en aparta studo („de" 163/1990), la taskoj estis sufiĉe bone realigitaj: Publikiĝis ekde 1970 pli ol 100 germanlingvaj sciencaj materialoj en GDR, el la plumo de 37 personoj, estis organizitaj 9 interlingvistikaj (germanlingvaj) seminarioj por profesiaj lingvistoj, estis verkitaj ekspertizoj k.s. Pli ol 60 prelegojn oni povis prezenti en altlernejoj. En GDR estis defenditaj du doktorigaj disertacioj. 1988 Esperanto estis enkondukita en 8 altlernejojn. Kaj en Humboldt-Universitato 1988 instaliĝis docenteco pri interlingvistiko *(d-ro sc. D. Blanke)*. Ni ĉi tie ne kaŝu, ke ĉiam denove troviĝis esperantistoj en GDR, laŭ kiuj tiu scienca agado estis tute superflua, neutila por la praktiko, eventuale persona hobio de *Blanke*, kiu per tio plenigis sian labortagon. Nu – intertempe fariĝis tute klara la gravega strategia signifo ĝuste de tiu interlingvistika/esperantologia agado por la esperantista agado en GDR entute. Multajn antaŭjuĝojn en sciencaj, partiaj kaj administraj rondoj oni povis disbati ĝuste per la montrebla scienca materialo. Tio ankaŭ validas por certaj sukcesoj en la amaskomunikiloj. Krome, sen tiu agado la ŝtata eldonejo Enciklopedio en Leipzig ne estus tiom facile pretinta publikigi vortarojn kaj lernolibrojn. En universitatoj ni hodiaŭ havus neniujn poziciojn sen tiu agado. Ankaŭ en la internacia skalo tia agado donis fruktojn ktp. ktp. Kaj krome, *Blanke*, kiu pleje aktivis en la medio de interlingvistiko/esperantologio, ĉefe faris *tiun* laboron *semajnfine* aŭ *postlaborhore*. La okazigo de la „1-a Centra Renkontiĝo de Esperantistoj en Germana Kulturligo", de la 26-a ĝis 27-a de septembro 1970 en Karl-Marx-Stadt estis la kulmino de la 3-a periodo de la priskribita historio. Ĝin partoprenis 200 delegitoj el pli ol 100 grupoj. Ankoraŭ mankis eksterlandaj gastoj („de" 44/1970).

Dum la postaj jaroj sekvis ankoraŭ 4 pluaj tiaspecaj centraj arangoj: la 2-a 1974 en Berlin, la 3-a 1979 en Rostock, la 4-a 1984 en Dresden kaj la 5-a 1990 en Brandenburg. Tiaj Centraj Renkontiĝoj en aliaj landoj estas nomataj „landaj kongresoj". Ili havis kultur-fakan, laboran, spertinterŝanĝan kaj distran komponantojn.

Sed oni tie ne elektis la gvidorganojn. Tion faris la „Centraj Konferencoj".

Resumante la 3-an periodon, oni povas konstati, ke dum la 5 jaroj estis farita sufiĉe multflanka kompleksa laboro. La strukturo de la Esperanto-movado ellaboriĝis kaj stabiliĝis. La praktika kaj faka agadoj bone startis kaj alportis fruktojn. Samtempe necesas substreki, ke ne ĉiuj esperantistoj estis kontentaj, ke ili povis agi oficiale nur en la kadro de neesperantista organizaĵo.

Ili imagis iun komplete sendependan organizaĵon. Ankaŭ la politika profilo de la organizaĵo ne plaĉis al ĈIU. Tamen, la plej granda parto iom post iom konvinkiĝis, ke Kulturligo kun sia strukturo ja donis tre bonan eblecon por esperantista agado. Ni substreku tamen: Ĉiuj menciitaj aktivecoj de la unuaj kvin jaroj – kaj tio ankaŭ validas por la postaj jaroj – estis fruktoj de obstina, sistema kaj lerta batalo kontraŭ misfido, antaŭjuĝoj, nekomprenemo, miskomprenoj kaj – timo (pro la ebleco de individuaj kontaktoj eksterlanden, kion Esperanto ja ebligis). CLE do devis taktike agi, kaj tion faris. Aparte menciindas la granda lerteco de la prezidanto de CLE, *Rudi Graetz*, homo kun klaraj politikaj konvinkoj (li estis komunisto) kaj klera, elasta kaj krome arda esperantisto. Liaj pozicio kaj kapabloj kiel diplomato tre helpis venki kontraŭstarojn.

2.4. 1970–1976: De la 1-a Centra Renkontiĝo ĝis aliĝo de CLE al UEA

Gravajn impulsojn por la posta evoluo sendube donis la menciita 1-a Centra Renkontiĝo. La esperantistoj rimarkis, ke ili ja estas forto, ne plu malgranda sekto. Tio kuraĝigis la grupojn kaj membrojn. Tamen, ĉi tiun grandan aranĝon ne estis partoprenintaj eksterlandaj gastoj. Kial? Simple ankoraŭ mankis veraj internaciaj ligoj. Do – tian mankon elimini estis la ĉefa tasko por la 4-a etapo. Pro tio tre grava estis la okazigo de la 3-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj, de la 25-a ĝis 29-a de marto 1971 en Berlin („de" 46/1971). Ĝin partoprenis reprezentantoj de la Esperanto-asocioj el Bulgario, ĈSSR (du asocioj), GDR, Hungario, Pollando kaj Soveta Unio (Esperanto-komisiono ĉe SSOD). Entute, ĝis 1989, okazis 22 konsultiĝoj. La konsultiĝoj estis iniciatitaj de Hungara Esperanto-Asocio *(Béla Berceli)* kaj Bulgara Esperanto-Asocio *(Nikola Aleksiev)*. La celo estis spertinterŝanĝo, reciproka informado kaj reciproka subtenado. Apartan movadopolitikan signifon la konsultiĝoj havis en la tempo, kiam *Ivo Lapenna* estis la prezidanto de UEA. La komuna pozicio de la organizaĵoj kutime partoprenantaj la konsultiĝon, estis grava, kvankam ne nepre decida por la ŝanĝoj en la Estraro de UEA en 1974 (Hamburgo), post kiam *Humphrey Tonkin* estis elektita nova prezidanto de UEA. La konsultiĝoj akceptis rekomendojn, kiuj estis publikigitaj nur dum la lastaj jaroj. Kompreneble, ĉi tiuj aranĝoj havis certan konspiran karakteron, aliflanke ne tiom, kiom oni supozis en la internacia Esperanto-movado. Ĉiu asocio restis tute memstara, kaj ne devis (aŭ ne povis) konsideri la rekomendojn. Tiu sistemo de la konsultiĝo havis nepre stabiligan signifon por la internacia Esperanto-movado kaj aparte helpis al unuopaj organizaĵoj en la orienteŭropaj landoj. La informinterŝanĝo kaj reciproka solidareco estis tre grava por CLE, eniri la internacian movadon, fariĝi kolektiva membro en ties organizaĵoj kiel UEA kaj TEJO. La konsultiĝoj okazis en jenaj urboj: 1969: Budapest (Hungario), 1970: Budapest (Hungario), 1971: Berlin (GDR), 1972: Smoljan (Bulgario), 1973: Budapest (Hungario), 1974: Sofio (Bulgario), 1975: Mělnik (ĈSSR), 1976: Krakovo (Pollando), 1976: Moskvo (do 1976 dufoje!), 1977: Karl-Marx-Stadt (GDR), 1978: Poprad (ĈSSR), 1979: Višegrad (Hungario), 1980: Sofio (Bulgario), 1981: Přerov (ĈSR), 1982: Jerevan, (USSR), 1983: Radziejowice (Pollando), 1984: Bad Saarow (GDR), 1985: Pisanica (Bulgario), 1986: Poprad (ĈSSR), 1987: Budapest (Hungario), 1988: Budějovice (ĈSSR), 1989: Moskvo (USSR). Krom la supre menciitaj partoprenintaj landoj (en la 3-a Konsultiĝo) foje ankaŭ partoprenis delegitoj el Vjetnamio, Kubo, Rumanio kaj Jugoslavio (oberservanto). La 22-an en Moskvo krome partoprenis la vicprezidanto de UEA, *Yosimi Umeda* kaj la ĝenerala direktoro de UEA, *Simo Milojeviĉ* („de" 156/1989). Tiu fakto jam montras, ke la ĝisnuna sistemo fariĝis superflua, La nova tempo postulas iun spertinterŝanĝan konsultiĝon de la Esperantoorganizaĵoj en Eŭropo.

Post tiu ekskurso ni revenu al la jaro 1971. Ĝi estis grava por la internaciaj ligoj de CLE ankaŭ pro tio, ĉar la Junulara Sekcio fariĝis membro de TEJO dum la 27-a Internacia Junulara Kongreso en Edinburgh („de" 49/1971). La viglecon de la junulara agado, cetere, ne nur atestas tiu aliĝo sed ankaŭ la jam 2-a internacia junulara tendaro en Rabenstein ĉe Karl-Marx-Stadt (la unua: „de" 43/1970, la dua: „de" 50/1971) somere 1971, kiun partoprenis pli ol 50 junaj esperantistoj ne nur el GDR, sed ankaŭ el Bulgario, Hungario, ĈSSR kaj Pollando. La trian oni okazigis somere en 1972, tuj post la TEJO-kongreso en Bydgoszcz/Pollando. Ĝi okazis de la 24-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Partoprenis preskaŭ 100 junuloj el 8 landoj, inter ili el Italio (familio *Renato Corsetti*) kaj Japanio („de" 55/56/1972).

Por la plua profiliĝo de la internacia agado, tipa por la priskribata periodo krome estis la 3-landa renkontiĝo en Seifhennersdorf (ĈSSR/Pollando/GDR) kun 120 partoprenintoj („de" 57/58/1973). Krome estis tre grava la oficiala partopreno de TEJO en la „Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj", kiu okazis de 28-a de julio – 5-a de aŭgusto 1973 en Berlin („de" 59/60 – 1973). Pri kelkaj faktoj ni siatempe estis fieraj: la prezidanto de TEJO, *d-ro Renato Corsetti* staris apud *Yasser Arafat*. Kaj ... ankaŭ la intertempe fifama *Egon Krenz* ludis rolon. Li, siatempe unu el la sekretarioj de FDJ (= Germana Libera Junularo de GDR), i. a. estis respondeca por la preparoj de la renkontiĝoj de specialistoj, okazontaj kadre de la festivalo. La aŭtoro partoprenis prepararanĝon por la festivalo, tie reprezentante la esperantistan prepargrupeton. Dum tiu aranĝo *Egon Krenz* ... laŭdis la esperantistojn pro ilia bona preparo. Nu jes. Al la plua internaciigo de la agado ankaŭ servis eksterlandaj lektoroj, ekz. *Stefani Palica* el Pollando gvidis intensan kurson en Stralsund, („de" 69/1975). Dum la postaj jaroj kursojn gvidis i. a. *Hezapĉiev* (Bulgario), *A. Pettyn* (Pollando), *Z. Barcsaj, E. Farkas* kaj *J. Pává* (Hungario), *St. Marĉek* kaj *A. Zaňariaš* (Slovakio) k. a. Krome oni devas mencii pli kaj pli da kontraktoj pri amikeco kaj kunlaboro, aparte sur distrikta kaj subdistrikta niveloj. La unua versăjne estis subskribita inter la Esperanto-grupoj de Leningrad kaj Dresden („de" 67/68 – 1974). Bone funkciis la kontrakto inter Leipzig kaj Plovdiv („de" 89/1978). Ankaŭ CLE subskribis kontraktojn kun siaj partneraj organizaĵoj: La 22-an de marto 1975 kun PEA („de" 71/1975). En 1978 estis subskribitaj la kontraktoj kun Ĉeňa Esperanto-Asocio kaj (la siatempa) Asocio de Slovakiaj Esperantistoj („de" 95/1979) kaj kun la en 1979 fondita Asocio de Sovetiaj Esperantistoj en la jaro 1984 („de" 124/1984). Kvankam kun la aliaj orienteŭropaj asocioj ne estis subskribitaj amikeckontraktoj, la kunlaboro ne estis malpli bona. Neniam bone funkciis, cetere, la kontrakto kun ASE. Hodiaŭ ni pli bone komprenas la kaŭzojn. En 1976 (5.–18.9.) okazis la unuan fojon ĉe Berlin relative sukcesa internacia aranĝo sur la kampadejo „Intercamping"-Krossinsee. Dum la postaj 4 jaroj estis ripetita tiu 2-semajna parte turisma, parte instrua aranĝo. Elemento de internacia respekto al MEM estis la partopreno de oficiala delegitaro de MEM en la internacia kongreso dum la Internacia Jaro de la Virino, kiu okazis en Berlin (20.–24.10.1975). Partoprenis *Ingrid Schödl* kaj *Hella Sauerbrey* („de" 75/1976). Gravajn stimulojn dum ĉi tiu periodo ricevis ankaŭ la interlingvistika agado: la unua neesperantista interlingvistika seminario en universitata kadro okazis la 10-an de marto 1972 en Jena („de" 57/58 – 1973). Aperis la unua iom grava interlingvistika studo en scienca revuo de GDR („Das Altertum" 1–2/1973) kaj *D. Blanke* defendis sian doktorigan disertacion pri Esperanto la 16-an de junio 1976 („de" 78 + 79/1976). Por la evoluo de laboristmovadaj esploroj tre gravaj estis la scienca kolokvo en Gotha pri la kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la germana-sovetia amikeco dum la tempo de la Respubliko de Weimar (3.5.1974, kp. de 65/66 – 1974). Aperis broŝuro rezulte de tiu kolokvo, kiun partoprenis eminentaj veteranoj de LEA, ekz. *Walter Kampfrad, Willy Vildebrand, Otto Bäßler, Werner Habicht, Ludwig Schödl* kaj *Rudi Graetz*[6]. *Dum tiu periodo ni ankaŭ konstatas la unuajn iom grandajn sukcesojn en la gazetaro (kvankam ili neniam estis tro grandaj). En la prestiĝa ilustrita semajna revuo „Freie Welt" (Libera Mondo), revuo de la Societo por Germana-Sovetia Amikeco, aperis en n-ro 50/1972 4-paĝa intervjuo de Gisela Reller* kun *D. Blanke*. Laŭ grandeco tiu kontribuo restis nesuperita ĝis nun kaj en 1973 aperis la 300-a kontribuo en la Esperanto-serio de la taggazeto „Der Morgen" (La Mateno, organo de la Liberaldemokratia Partio de Germanio), el la plumo de *Peter Levsen*. Kelkaj dekoj da artikoloj de *Levsen* ankaŭ aperis dum la 70-aj/80-aj jaroj en kelkaj gazetoj de la Kristandemokratia Partio (CDU). Ĉi-loke ni menciu, ke ekde „der esperantist" 38–39 (1970) regule aperis superrigardoj pri artikoloj priesperantaj, aperigitaj en la gazetaro de GDR. Dum la lastaj jaroj aperis 200–400 artikoloj jare. Rekordon oni notis pro la jubilea jaro en 1987 kun pli ol 400 artikoloj („de" 152/1988). En 1989, pro la sociaj šanĝoj en GDR, kiuj negative efikis al la gazetara agado de GDREA, nur aperis iom pli ol 200 artikoloj („de" 163/1990). Ĉiuj listigitaj artikoloj, aparte tiuj en la regionaj, subdistriktaj kaj distriktaj gazetoj, estas grava bazo por pli detala prezento de la historio de GDREA. Krome, ĉiuj tiaj materialoj bone montras, kion la membroj de GDREA trovis necese por verki, por ke la artikoloj havu šancon aperi.

En la jaro 1973 aperis la unua propra faka eldonaĵo de CLE. Temas pri fotorepreso de la gramatiko de *Hermann Göhl*. Dum la sekvaj jaroj daŭre aperis iuj fakaj materialoj, kvankam la daŭra papermanko tre limigis la eblecojn[7]. Por la priskribata periodo ankaŭ eblas noti plidemokratiĝon de la esperantista agado en Kulturligo. La unuaj membroj de Centra Laborrondo, en la jaro 1965, fakte ne estis demokrate elektitaj, sed nomumitaj de la Prezidia Konsilantaro de Kulturligo. En la jaro 1972, finfine, okazis la 1-a Centra Konferenco de la Esperantistoj en Germana Kulturligo (27.–28.5. en Berlin). Tio estis konferenco de delegitoj, kiuj unuan fojon sekrete elektis la membrojn de Centra Laborrondo („de" 54/1972). Se en 1965 estis nur 11 membroj, la en 1972 elektita CLE havis 32 membrojn („de" 55/56 – 1972). Partoprenis unuan fojon similan aranĝon en GDR ankaŭ eksterlandaj gastoj, kvankam nur el la socialismaj landoj. La konferenco akceptis novajn gvidliniojn („de" 54/1972 + 57/58 – 1973). Sekvaj Centraj Konferencoj, en eksterlando ili estus landaj kongresoj kun elektoj, okazis jene: 2-a: 1977 en Leipzig, 3-a 1981 en Karl-Marx-Stadt (fonda kongreso de GDREA), 4-a 1987 en Leipzig. Se oni komparas la listojn de la membroj de Centra Laborrondo (ekde 1981: Centra Estraro de GDREA) oni povas konstati plijuniĝon kaj plifakiĝon de la gvida organo, kaj sekve plikompetentiĝon. La liston de la membroj de CLE (resp. poste de la CE de GDREA), oni trovas en „de" 1–2 (1964), 55/56 (1972), 85 (1977), 113/114 (1982) kaj 152 (1988). Dum tiu etapo en la evoluo de CLE ankaŭ okazis la unuaj junularaj seminarioj por aktivuloj (1975 kaj poste ĉiujare unu seminario), seminarioj pri la metodiko de la instruado de Esperanto, la plej multaj sub la gvido de d-ro *Till Dahlenburg*, ekz. de la 8-a ĝis 11-a de decembro 1976 jam la 3-a. Dum tiu etapo (= 1973) ni ankaŭ notas la aperon de la unua esperantlingva beletraĵo en GDR. Temas pri la fama romano de *Bruno Apitz* „Nuda inter lupoj", kiu priskribas la sorton de infano en la faŝisma koncentrejo Buchenwald (Buňenvalt). La romanon estis tradukinta esperantisto el Berlin, la juristo *d-ro Karl Schulze*. Ĝin eldonis la eldonejo Edition Leipzig („de" 57–58/1973). Por esperanta beletraĵo estis absolute rekorda la eldonkvanto de 8000 ekzempleroj, se oni konsideras la kutiman kvanton en orienteŭropaj landoj de 3000–5000 ekz. kaj en okcidentaj landoj de 1000–2000 ekz. La libro vendiĝis dum nur 1 jaro. Inter alie sole 3000 ekz. iris al Soveta Unio, 1500 al Pollando k. s. Post tiu sukcesa komenco la sama eldonejo aperigis la faman „Trigroŝan Romanon" de *Bert Brecht*, same en la traduko de *Karl Schulze*. Ĝi aperis en 1977, kunlabore kun la eldonejo Bleicher en Gerlingen, FRG („de" 86/1977, 89/1978). La eldonkvanto estis

5000 ekz. La tria titolo estis malpli sukcesa. Temas pri „La perdita honoro de iu Katarina Blum" de *Heinrich Böll*. Ĝin ne tradukis Karl Schulze sed *Richard Schulz* (= Rikardo Ŝulco) el FRG. La tradukon oni plurfoje kvalifikis dubinda. La libro aperis, same en kunlaboro kun Bleicher-Eldonejo, en 1978 (kp. de 94/1979; 102/1980). Per tiu tria malfacile vendita titolo finiĝis la eldono de gravaj esperantlingvaj beletraĵoj en GDR. (Nur en 1987 aperis en Leipzig „Hunda vivo", kolekto de originalaj humuraj rakontetoj de *Joachim Schulze*).

Kaj ni ne forgesu mencii la modestaspektan aperigon de „Maks kaj Moric" de *Wilhelm Busch*, en la traduko de *Wilfried Hofmann* (Karl-Marx-Stadt: Esperanto-Verband, 1983). Jen ekskurso pri beletro. Sed ni revenu al la ĉefa karakterizo de la 4-a periodo. Ĝi estis la plua elformado de novaj agadkomponantoj kaj la pliprofundigo de en antaŭaj etapoj komencitaj. Sed la ĉefa karakterizo de ĉi tiu etapo estas la konstruo kaj intensigado de la internaciaj rilatoj de CLE. Per la aliĝo al UEA dum la 61-a Universala Kongreso de Esperanto (31.7.–7.8.1976) en Ateno, tiu grava komponanto en la agado de la esperantistoj de GDR trovis sian internacian agnoskon kaj samtempe bazon por plena internacia agado. UEA ne facilanime akceptis CLE. Antaŭ la ĉi-rilata voĉdono en la Komitato de UEA oni akre kaj multe diskutis, laŭtigis dubojn pro la politika profilo de CLE, ne bone komprenis la ligojn inter la esperantistoj kaj Kulturligo, timis eventuale neneŭtralan agadon de CLE en la neŭtrala UEA. Finfine la voĉdono donis pozitivan rezulton kaj oni akceptis CLE, se ni bone memoras, kun 4 kontraŭvoĉoj kaj 1 sindeteno. La esperantistoj de GDR, tion oni devas klare diri, fakte ne havis tro da eblecoj, vere aktive kunlabori en UEA, tiom kiom ili volis kaj kiom necesis. Pro la konataj vojaĝlimigoj nur 1–3 funkciuloj povis partopreni la universalajn kongresojn. Sed tiuj funkciuloj dum la kongresoj vere laboris, ne nur sidis en la Komitato de UEA sed aktive partoprenis ĝian laboron. Aparte en strategie iom gravaj komisionoj (ekz. la Elekto-Komisiono) kaj en sciencaj medioj ili estis tre aktivaj. En la jubilea jaro 1987 *D. Blanke* estis deklarita „La plej aktiva komitatano". UEA kompreneme konsideris la fakton de la valutomanko de CLE kaj akceptis, ke CLE pagis sian kolektivan kotizon nur por 500 membroj, kvankam estis multe pli da esperantistaj membroj en Kulturligo. Pro leĝo el la jaro 1975 (Verordnung über die Gründung und Tätigkeit von Vereinigungen) individua membreco de GDR-civitano en internaciaj neŝtataj organizaĵoj (kiel UEA) fakte nur eblis kun la permeso de la koncerna ministerio. Tio fakte al multaj baris la vojon, fariĝi individuaj membroj, aldone al la monmanko. Tio nun ŝanĝiĝis.

Kontribuon al UEA flanke de CLE (kaj de la posta GDREA) oni povas konsideri la malmultekostajn kaj altnivelajn internaciajn fakajn seminariojn en Ahrenshoop kaj Bad Saarow (ekde 1978), kiuj famiĝis en la Esperanto-movado kaj havis certan pozitivan influon al la diskutado de strategie gravaj demandoj de la movado.

2.5.1976–1981: De la aliĝo al UEA ĝis la fondo de GDREA

La komencon de la 5-a periodo markas la 2-a Centra Konferenco, kiu okazis de la 5-a ĝis 7-a de novembro 1977 en Leipzig („de" 81/1977), ĝin partoprenis 180 delegitoj kaj gastoj el orienteŭropaj landoj. La konferenco elektis la novan Centran Laborrondon. Unuan fojon partoprenis reprezentantoj de UEA, nome la vicprezidanto *d-ro Renato Corsetti* (Italio) kaj *Anna Brennan* (Britio). Dum la 5-a periodo ĉiuj ĝisnunaj komponantoj estis daŭrigitaj kaj pliprofundigitaj. La junulara agado de la distrikto Neubrandenburg estis aparte sistema. Ekde 1977 („de" 82/1977) en tiu distrikto regule okazas junularaj konferencoj. La internacia junulara seminario en Rathenow (3.–9.11.1980, „de" 105/1981) trovis inter siaj partoprenantoj la estontan prezidanton de TEJO *Jan Koszmaluk* el Pollando.

La fakaplika agado plue vigliĝis. En 1977 fondiĝis la Fakgrupo de medicinistoj-esperantistoj, sub gvido de *d-ro Giso Brosche* („de" 87/1978) kaj okazigis en 1978 sian unuan konferencon en Schwerin („de" 93/1979). Ĝuste por ili, sed ankaŭ por la pacientoj, en 1977 aperis en la eldonejo Ambrosius Barth Leipzig la „Ärztlicher Dolmetscher" (Kuracista Interpretisto) en 14 lingvoj, inter ili en Esperanto (de 83/1977). La medicinistoj post la konferenco en Schwerin okazigis du pluajn en Karl-Marx-Stadt kaj Potsdam. La kulmino (sed ankaŭ bedaŭrinde la fino) en la agado de la fakgrupo estis la Internacia Medicina Esperantista Konferenco en 1985 en Schwerin (IMEK V: „de" 134/1985). Post tio la aktivecoj reduktiĝis al partopreno en la IMEK-oj, okazantaj ĉiun duan jaron.

La fervojistoj (sub gvido de *Achim Meinel*) ankaŭ en 1977 fondis sian fervojistan fakgrupon (86/1977) kaj ekeldonis en 1979 sian modestaspektan sed enhave altkvalitan bultenon „Fervojistaj Novaĵoj" (redaktoro *Horst Jasmann*), de kiu ĝis 1990 aperis entute 34 numeroj. En 1979, kvazaŭ kadro por la diversaj fonditaj kaj fondotaj fakgrupoj, ekestis la Scienc-Teknika Komisiono sub gvido de *Richard Partecke* („de" 99/1980) kaj poste gvidita de Michael Behr. Al la faka profilo de ĉi tiu periodo apartenas lanĉo de la interlingvistikaj seminarioj en Ahrenshoop, destinitaj por profesiaj lingvistoj. La 1-a okazis de la 16-a ĝis la 19-a de aprilo 1979 kaj traktis la temon „Lingva komunikado kaj interlingvistiko" (16.–19.4.79, „de" 95/1979). Sekvis jenaj pluaj

2. „La internacia lingva situacio kaj mondlingvoj" (18.–22.11.1980, „de" 105/1981),
3. „Planlingvo kiel faklingvo" (11.–15.10.1981, „de" 110/81),
4. „Formalaj kaj semantikaj problemoj de la ĝenerala leksiko kaj fakleksiko sub interlingvistika aspekto" (21.–25.11.1982, „de" 116/1982),
5. „Lingva konfrontado sub interlingvistika aspekto" (30.10.–3.11.1983, „de" 122/1983).
6. „Bazaj problemoj de interlingvistiko kaj eblecoj de planlingva komunikado" (28.10.–1.11.1984, „de" 129/1985),
7. „Lingvistiko – lingvoplanado – planlingvoj: socilingvistikaj aspektoj de interlingvistiko" (10.–14.11.1985), „de" 136/1986),
8. „Aspektoj de la internacia lingvobariero" (28.10.–1.11.1986, ĉi-foje escepte ne en Ahrenshoop sed en Zempin, „de" 141/1987),
9. „Ĝenerala lingvistiko kaj esperantologio" (30.10.–3.11.1988, „de" 153/1989).

Tiujn seminariojn sume partoprenis pli ol 300 profesiaj lingvistoj el GDR el 25 universitatoj, altlernejoj, akademioj kaj eldonejoj (kp. pri la rezultoj de la interlingvistika agado en GDR „de" 163/1990).

Revenante al la jaro 1978, ni menciu, ke tiam ankaŭ lanĉiĝis dua tre sukcesa seminaria serio. La internaciaj fakseminarioj en Ahrenshoop kaj Bad Saarow havis strategian signifon ne nur por GDREA sed ankaŭ influis internaciskale. La unua okazis en Ahrenshoop (17.–23.4.1978) sub la temo „Sciencaj aspektoj de Esperanto" („de" 89/1978). La prelegoj aperis libroforme (D. Blanke, red.): La internacia lingvo. Sciencaj aspektoj. Berlin 1979, 235 p.). Sekvis dum la jaroj pluaj seminarioj:

2. „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado" (18.–24.11.1979, Bad Saarow, „de" 92/1980),
3. „Problemoj de la planado de UEA" (16.–21.10.1981, Bad Saarow, „de" 111/1982). Ĉi tie partoprenis i.a. *Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Gregoire Maertens, Flora Szabo-Felsö, Werner Bormann* k. a.
4. „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko" (7.–12.12.1982, Bad Saarow, „de" 117/1983),
5. „Problemoj de la metodiko de Esperanto-instruado por plenkreskuloj" (9.–14.12.1985, Bad Saarow, „de" 136/1986),
6. „Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la parolantaro de Esperanto" (10.–15.11.1986, Bad Saarow, „de" 142/1987),
7. „Sojle al la dua jarcento – lingvo kaj parolantaro – kion konservi kaj kion ŝanĝi?" (5.–10.12.1988, Ahrenshoop, „de" 154/1989),
8. „Esperanto – objekto de akademia esplorado kaj instruado" (27.4.–2.5.1990, Bad Saarow, „de" 162/1990).

Kaj kiel tria serio de aranĝoj en 1978 komenciĝis la renkontiĝoj de iamaj membroj de GLEA. La 1-a okazis la 14-an de junio 1978 en Berlin („de" 90/1978), la 12-a okazis en 1990.

Post tiu ekskurso pri la fakaj seminarioj de CLE/GDREA, lanĉitaj dum la 5-a periodo, ni ankaŭ menciu aliajn lanĉojn: En la jaro 1977 komenciĝis la serio de Someraj Esperantistaj Familiaj Tendaroj (SEFT) en la lago-regiono de Meklenburgio, kiun organizis *Werner Pfennig* („de" 92/1978). La 13-a kaj ne lasta okazis dum aŭgusto 1990. Menciindas same la serio de Internaciaj Turismaj Renkontiĝoj de esperantistoj an Ercmontaro (ITRE), kiu komenciĝis en 1978, ĉiujare, alterne, 5-taga aranĝo sur la GDR-a aŭ Ĉeña flanko de la Ercmontaro. Flanke de GDR aparte aktivis *Rudolf Eichler*. Do germana – ĉeña aranĝo. Al la gravaj internaciaj atingoj ankaŭ apartenis la 10-a Konsultiĝo de la Esperanto-organizaĵoj de la socialismaj landoj en 1977 (10.–13.3.), kiu okazis en Karl-Marx-Stadt.

Trajno de amikeco dum oktobro 1979 el Dresdeno sub gvido de *Walter Röhner* vojaĝis al Leningrado („de" 99/1980). La internaciaj foiraj renkontiĝoj en Leipzig fariĝis pli modernaj (kp. „de" 90/1978, „de" 95/1979) kaj evoluis al la plej alloga internacia aranĝo de GDREA, pro la alta kvalito, kiun garantiis la Leipzig-anoj kaj pro la simpligo de la enveturaj proceduroj por okcidentlandanoj, ŝuldita al la Foiro de Leipzig. Parolante pri IFER ni menciu la plej interesajn aranĝojn el tiu serio:

1978: „60-a datreveno de la socialisma oktobro-revolucio" („de" 90/1978),
1979: „Jen kiel ni kreskis" (= 30 jaroj GDR, „de" 95/1979),
1981: „Frataj landoj – partneraj urboj – bonaj geamikoj" („de" 107/1981),
1982: „Goethe – Faust – Leipzig" („de" 113/114 – 1982),
1983: „Venkintoj de la historio" (pri Dimitrov 1933 en Leipzig, „de" 118/1983),
1985: „Leipzig – urbo de la muziko" („de" 131/1985),
1986: „Leipzig – urbo de la laborista Esperanto-movado" („de" 137/1986),
1987: „Cent jaroj de Esperanto – lingvo de interpopola kompreniĝo" („de" 143/1987),
1988: „Homo kaj sciencteknika revolucio" („de" 148/1988).

En 1989 ne okazis IFER sed anstataŭ tio JES, t. e. Jarmeza Esperantista Semajnfino kadre de la Konstanta Agrikultura Ekspozicio de GDR („de" 157/1989).

Por la sukcesigo de tiuj altkvalitaj internaciaj aranĝoj en Leipzig i.a. aparte agadis (se ankaŭ malsame laŭ jaroj) *Rolf Beau, Michael Behr, Jürgen Hamann, Ino Kolbe, D-ro E.D. Krause, Achim* kaj *Sabine Schulze*. Tiom pri la IFER-serio.

Sed ni revenu al la jaro 1977, en kiu la kunlaboro kun la Packonsilantaro de GDR pliintensiviĝis. Fakte jam ekde 1972 CLE estis reprezentita en tiu grava instanco per sia prezidanto *Rudi Graetz*. Post lia morto membro de tiu instanco fariĝis *D. Blanke*. Kadre de internacia packonferenco *Blanke* sukcesis intervjui la prezidanton de la Monda Packonsilantaro *Romesh Chandra*, kiu diris i.a.:

„Se vi diras ‚Esperanto por la paco', mi kredas, ke vi mencias du vortojn, kiuj konsiderinde signifas la samon". („de" 86/1977). Hodiaŭ ni scias, ke la Monda Packonsilantaro devas konsiderinde plimoderniĝi kaj liberiĝi el certa rigideco. Kaj tamen ...

Dum ĉi tiu periodo ni rimarkas plimultiĝon de Esperanto-kursoj en Popolaj Altlernejoj, kiun tre subtenis la apero de nova lernolibro de Esperanto „Taschenlehrbuch Esperanto" de *Till Dahlenburg/Peter Liebig*. La lernolibro en 1990 aperis en la 5-a eldono, kun ĉiuj eldonoj sume 30.000 ekzempleroj. Tre utila por la praktika agado estis la komenco de regionaj renkontiĝoj de la esperantistoj. La distriktaj laborrondoj de Rostock, Schwerin kaj Neubrandenburg komencis la serion en la jaro 1977. Similajn aranĝojn ĉiujare okazigis la distriktoj Erfurt, Gera kaj Suhl. Dum ĉi tiu periodo la esperantistaron trafis peza bato. La prezidanto de CLE, *komerca konsilisto Rudi Graetz* forpasis la 1-an de oktobro 1977 („de" 86/1977). Transprenis lian funkcion *Rudolf Hahlbohm*, la tiama vicprezidanto de CLE. *Hahlbohm* havis tiun funkcion ĝis 1981, ĝis la fondo de „Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR" (GDREA). Kial oni fondis GDREA? Ĉu la ĝistiama formo de la esperantista organiza strukturo ne sufiĉis? Nu – fakte ĝis kaj dum la 5-a periodo preskaŭ ĉiuj gravaj komponantoj de la esperantista agado estis sufiĉe evoluintaj. Oni povis propagandi la lingvon, instrui ĝin (kvankam ne en lernejoj), eldonis fojfoje esperantaĵojn, aplikis Esperanton por la eksterlanda informado, disponis pri scienca komponanto, pri internaciaj ligoj, organizis internaciajn aranĝojn k. s. Tamen, en la internacia movado oni ne tre bone komprenis, kio fakte estas CLE. Ĉu gvidantaro (kio ĝi estis) aŭ organizaĵo? Krom tio asocio en Kulturligo havis pli altan statuson ol la Centraj Laborrondoj, de kiuj ekzistis pluraj. Do – necesis adapti la formon kaj strukturon de la enlanda movado al la internaciaj kutimoj samtempe plialtigante ĝian prestiĝon. Dum la 3-a Centra Konferenco en Karl-Marx-Stadt (22.–24.5.81) okazis la fondo de GDREA („de" 108/1981, „de" 109/1981). Oni akceptis novajn „gvidliniojn" por la agado kaj elektis la Centran Estraron de GDREA („de" 113/114/1981). Prezidanto fariĝis la diplomita filozofo *Hans Heinel*. *Heinel* jam estis en la prezidio de CLE ekde 1972 kaj tre saĝe kaj ekvilibre kungvidis CLE. Li estis direktoro de kvalifikejo por partiaj funkciuloj en subdistrikta urbo de la distrikto Karl-Marx-Stadt (Flöha). Lia politika klero (laŭ la siatempa interpreto!), lia kunlaboremo kaj lojaleco rilate al alipensantoj, lia firma volo antaŭenigi Esperanton en GDR, estis gravaj kondiĉoj por prezidanteco dum tiu periodo. Ke ĉe la pinto de GDREA agis klera partia funkciulo, estas unu el la kaŭzoj (krom la konkreta agado en praktikaj kaj teoriaj medioj), ke GDREA povis sufiĉe senĝene evolui en socia sistemo, kies nigrajn flankojn multaj plene komprenis nur post la disfalo de la rigida reĝimo en la jaro 1989 kaj poste.

Ke en 1990 *Heinel* ne estis reelektita kiel prezidanto ne parolas kontraŭ li, sed nur karakterizas la novajn bezonojn rezulte de la tute ŝanĝiĝintaj sociaj kondiĉoj en GDR.

Resume por la 5-a periodo: La movado elformis propran fa-

kan profilon kaj konsiderinde pliinternaciiĝis. Ĝi atingis pli altan nivelon.

2.6. 1981–1987: De la fondo de GDREA ĝis la jubilea jaro

La 6-a periodo plue plifortigis la Esperanto-movadon en GDR. Oni daŭrigis la jam establiĝintajn agaddirektojn kaj aldonis novajn. Do okazis la internaciaj aranĝoj IFER, SEFT, ITRE. Okazis la interlingvistaj, la laboristmovadaj kaj internaciaj aranĝoj. Al la gravaj internaciaj aranĝoj dum ĉi tiu periodo apartenas la 17-a Konsultiĝo de la Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj, kiu okazis 1984 (26.–31.3.) en Bad Saarow („de" 124/84) kaj la internacia pacrenkontiĝo en Dresden („de" 115/1982). Cetere, la 10-a Kongreso de Kulturligo 1982 en Dresden („de" 113/114-1982) ankaŭ havis oficialajn eksterlandajn gastojn. El ĉiuj 40 fakoj de Kulturligo la plej multaj eksterlandanoj venis pro GDREA. Al la internaciaj aranĝoj aldoniĝis plua serio, tiu de la Potsdamaj Someraj Esperanto-Tendaroj (PoSET), organizita de *Brigitte Raabe* kaj *Hanna Scheffs*. La unua PoSET okazis 1985 („de" 134/1985) kaj la lasta en 1989. Komenciĝis iom sistema agado inter lernantoj, pro kio ekestas serio de lernejanaj (aŭ siatempe „junpioniraj") feriaj unusemajnaj renkontiĝoj, iniciatitaj de *Fritz Wollenberg*. La unua okazis 1981 en Berlin („de" 110/1981). Pliaj organiziĝis 1982 kaj 1983 en Berlin kaj 1984–1985 en Strausberg. En aliaj lokoj similaj aranĝoj okazis ĉiujare ĝis 1989. La 4-a Centra Renkontiĝo en 1984 en Dresden kiun ĉeforganizis d-ro *Günther Minkwitz* estis la plej multnombra kun 260 partoprenintoj (inter ili 60 eksterlandanoj), kaj ĝi stimulis la praktikan kaj fakan agadon („de" 128/1984).

Por fari pli multe por la lingva perfektigo aparte la esperantistoj de la distrikto Neubrandenburg tre sisteme organizis semajnfinajn intensajn kursojn. La 20-a okazis en 1989. Sed ankaŭ en la sudo de GDR oni iniciatis iun serion de intensivaj kursoj sub la nomo „Turingia Esperanto-Lernejo" sub gvido de d-ro *Joachim Hußner*. Ĝi malfermiĝis en 1986 („de" 137/1986). Iom poste fondiĝis „Saksa Esperanto-Lernejo" („de" 150/1988), sub gvido de d-ro *Erich-Dieter Krause*. Ambaŭ „lernejoj" okazigis lingvajn ekzamenojn.

Tre grava por la propagando de Esperanto kaj por la praktika agado estas la oferto de publicaĵoj. Intertempe oni ja povis aboni pli ol 15 esperantajn gazetojn pere de la poŝto kaj pere de GDREA, tamen oni sentis la mankon de pluaj revuetoj apud „der esperantist", kiu ja unuavice estis faka periodaĵo. Pro tio estis tre bonvena la kvalita pliboniĝo de la informilo de la distrikta estraro de GDREA Leipzig. Kiel „Informilo Esperanto" ĝi ekaperis jam en 1975, tre lerte redaktita (de *Jürgen Hamann*) ofsete presita bulteno, kiu poste, sub la redakto de *Michael Behr*, fariĝis la „Komuna Esperanto-Informilo de la distriktaj estraroj Leipzig kaj Halle". Kaj ekde 1/85 la redaktadon transprenis la grafikisto kaj ĵurnalisto *Joachim Schulze*. La bulteno ekde 1/1985 ĝis 1/1990 aperis sub la nomo „Saksa Kuriero". Entute (ekde 1975) aperis 86 kajeretoj, kiuj bone spegulas la lokan kaj regionan agadon, sed samtempe pli kaj pli internaciiĝis. Ĉi-lige ankaŭ valoras mencii la iniciaton de *Hans-Peter Bartos* el Halle, kiu ekde 1987 eldonas la bultenon „Novaĵoj el Halle" (1/87), kiu transnomiĝis ekde 5–6/1987 en „Die rationelle Sprache" (La racia lingvo). La bulteno estas germanlingva kaj destinita unuavice por la neesperantista sed interesita (aŭ varbebla) publiko. En 1990 aperis ankoraŭ la n-ro 3–4/1990. „Saksa Kuriero" aperis kun eldonkvanto de 1500 ekzempleroj. Similan kvanton havas „Die rationelle Sprache". La plej malnova regiona bulteno verŝajne estas „La Baltmara Informilo", redaktata de *Werner Plate*. Ĝi ekaperis en la jaro 1968. Dum septembro 1990 aperis jam la 230-a numero. Eble ĉi-loke ni ion diru ankaŭ pri la gazetara laboro entute kiu kontinue pliboniĝis. Ĉiam pli kaj pli da artikoloj aperis ne nur en taggazetoj, sed ankaŭ en prestiĝaj semajnrevuoj kaj fakaj ĵurnaloj. La evoluon de la pergazeta informado oni povas sekvi laŭ la rubriko „La gazetaro pri ni", kiu en „der esperantist" ekde 1976 regule resumis la aperintan materialon.

En „de" 115 (1982) ni trovas superrigardon pri la evoluo de 1976–1981: En 1976 estis registritaj 77 artikoloj, 1977: 125, 1978: 215, 1979: 178, 1980: 192, 1981: 286. Krome ni trovas en la rubriko por la postaj jaroj: 1982: 303, 1983: 299, 1984: 239, 1985: 311, 1986: 231, 1987: 405, 1988: 327, 1989: 205. La unua kulmino en 1978 estas ŝuldita al la Universala Kongreso de Esperanto en Varna/Bulgario. En 1981 oni multe raportis pri la fondo de GDREA. En la postaj jaroj la nivelo restis iom simila, sed la rekordon oni atingis en la jubilea jaro kun 405 artikoloj. Dum la jubilea jaro ankaŭ okazis televida programo kaj pli da radiointervjuoj ol kutime (eĉ 30-minuta radio-scenaĵo kaj duhora rekta disaŭdigo).

Dum la 6-a periodo GDREA povis plue profundigi sian fakan komponanton. Aperis en 1983 la granda vortaro Germana-Esperanto de *Erich-Dieter Krause*. La dua eldono estas anoncita por 1990. En 1982 aperis de *D. Blanke* la germanlingva broŝuro „Esperanto kaj scienco", bone uzebla por informado en sciencistaj medioj. La dua eldono aperis en 1986 („de" 143/1987). Per siaj „6 Tezoj pri terminologia laboro" („de" 112/1982) kaj aliaj publicaĵoj) *Wera Dehler* (poste *Wera Blanke*) grave stimulis la internacian terminologian aktivadon konforme al la internacia terminologia scienco, kiun ŝi kunmotoras ĝis nun. La fondo de Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC) en la jaro 1987, kadre de la jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, estas rekta sekvo de ŝia agado.

Rimarkindan terminologian laboron ankaŭ faris la fakgrupoj de la fervojistoj. *(Horst Jasmann/Horst Theurich)*, forstistoj *(d-ro Karl-Hermann Simon)*, komputistoj *(Michael Behr)* kaj iom la medicinistoj *(d-ro Giso Brosche)*.

Dum la jaro 1985 okazis atentinda evento: la V-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK) en Schwerin („de" 134/1985). Tio estis la unua tutsemajna faka kongreso, kiun GDREA estis organizinta. Partoprenis ĉ. 100 medicinistoj el 10 landoj. La tuta programo havis altan fakan nivelon. La aranĝo estis malfermita al ĉiuj landoj (simile kiel la internaciaj seminarioj en Ahrenshoop kaj Bad Saarow), do ne nur al la orienteŭropaj landoj. Se temas pri la distingo inter „socialismaj" kaj „nesocialismaj" landoj, verŝajne la ŝtato GDR estis plej rigida kaj izoliĝema, kio ja negative influis al la movado. Pro tio IMEK kaj ankaŭ la menciitaj internaciaj fakaj seminarioj kaj IFER estis de aparta graveco.

Plua tre grava atingo, kvankam persona, tamen kun pozitiva efiko al la movado, estis la habilitiĝo de *d-ro Detlev Blanke* pri interlingvistiko („de" 131/1985) kaj la apero de la ampleksa germanlingva libro de Blanke „Internaciaj planlingvoj" en la eldonejo Akademie-Verlag Berlin. La libro ricevis nekutime multajn recenzojn: entute 25, inter ili en 15 sciencaj fakrevuoj en 6 lingvoj. Hispanan tradukon pretigis *Francisko Briel* el Havano. Sed ĉu ĝi, kiel planite, aperos en la Kuba eldonejo José Marti en Havano, ankoraŭ ne estas klare. La habilitiĝo de Blanke pri interlingvistika temo estis en tutmonda skalo la unua, sekvata en la jaro 1986 de la brazilano *Geraldo Mattos*[8]. Tiuj faktoj plifortigis la pozicion de Esperanto en la intelektaj medioj de GDR kaj malfermis novajn pordojn. Ek-

zemple, estas nedubeble, ke la pozicio de interlingvistiko en la scienca pejzaĝo de GDR estis grava antaŭkondiĉo por la enigo de la temaro en la programon de la 14-a monda kongreso de lingvistoj en Berlin (10.15.8.1987), en kies kadro *d-roj Lötzsch, Blanke* kaj *Kuznecov* aranĝis la „Rondan tablon interlingvistiko/planlingvoj" („de" 146/1987). La jubilea jaro, 1987, estis aparte fruktodona por GDREA:

1. GDREA ricevis dum januaro 1987 komplete novan oficejon, kun entute 6 ĉambroj [+ 4 koridoroj, kuirejo kaj banĉambro]. Do, oni havis i. a. ejojn por la 2300 voluma biblioteko, kaj por la gazetkolektoj, krome kunsidejon por 20–30 personoj kaj komfortajn laborĉambrojn.
2. Nodiĝis bonaj kontaktoj al la UNESKO-Komisiono de GDR, kies prezidiano *d-ro Helmut Tautz* estis esperantisto kiel junulo kaj kunlaboris flanke de la GDR-delegacio en la jaro 1985 kadre de la 24-a asembleo de UNESKO en Sofio, en la prezento de la fama rezolucio pri Esperanto al la asemblea ferma kunsido. *Tautz* ankaŭ prelegis 1987 kaj 1988 kadre de la IFER-arangoj en Leipzig („de" 143/1987, „de" 148/1988). Parolante pri UNESKO necesas substreki, ke la ligiteco de UEA al UNESKO (en la kategorio B de konsultaj rilatoj) tre helpis al la evoluigo de la ligoj inter CLE kaj UEA. Eĉ por motivigi la neceson, ke GDREA estu reprezentata en la universalaj kongresoj, la ligiteco al UNESKO estis tre helpa argumento. La fama rezolucio de UNESKO okaze de la jubileo de Esperanto estis decida por la eldono de Esperanto-poŝtmarko en GDR. Necesas tion mencii, ĉar fojfoje en la movado la kunlaboro kun UNESKO ne estas sufiĉe alte taksata.
3. Tre sukcesa estis la centra jubilea festaranĝo de GDREA en Leipzig, kiu estis IFER '87 („de" 143/87). Alia originala aranĝo en la jubilea jaro estis la „Junulara arta semajno" (25.2.–2.3.1987) en Halle gvidita de H.-P. Bartos („de" 143/1987).
4. GDREA proponis al la Ministerio pri Altlernejoj kaj Faklernejoj enigi la instruadon de Esperanto en la altlernejojn. Tion oni akceptis en la jaro 1988, ekde kio eblis fondi Esperanto-kursojn en diversaj universitatoj.
5. Aparta sukceso estis la „Ronda tablo interlingvistiko/planitaj lingvoj" kadre de la „14-a monda kongreso de lingvistoj" en Berlin, pri kio ni supre menciis. Dum tiu kongreso oni prezentis entute 12 prelegojn pri interlingvistikaj temoj.
6. Aperis multaj gravaj kaj grandaj artikoloj en la gazetaro. Oni disaŭdigis radio-intervjuojn kaj en la televido prezentis bonan programon pri Esperanto. Krome oni aranĝis ekspoziciojn, prelegojn kaj alimaniere informis pri Esperanto. Aperis informiloj kaj germanlingva eksterseria numero de „der esperantist" kun superrigardaj materialoj pri diversaj aspektoj de Esperanto en teorio kaj praktiko.
7. Unuan fojon en sia historio la poŝto de GDR eldonis poŝtmarkon kun Esperanta temo. La relative granda kaj grafike tre efika eldonaĵo (0,85 markoj) aperis en kvanto de 2,3 milionoj.
8. Tre gravan stimulon por la plua agado de GDREA donis la jubileaj kongresoj de UEA kaj TEJO en Varsovio kaj Krakovo, kiujn partoprenis multaj GDR-anoj.
9. Dum la jubilea jaro ankaŭ okazis la 4-a Centra Konferenco de GDREA en Leipzig (3.–5.4.1987), kiu elektis novan Centran Estraron. Prezidanto reelektiĝis *Hans Heinel* („de" 144/1987).

La 6-a periodo do konsiderinde plifortigis la pozicion de la Esperanto-movado en la socio de GDR. Tion oni atingis per koncentro de relative malmultaj fortoj al strategie gravaj celoj. Tamen, venis la tempo por ataki novajn ankoraŭ ne atingitajn celojn.

2.7.1987–januaro 1990. De la jubilea jaro ĝis la elekto de nova prezidio de GDREA

La jubilea jaro al GDREA donis fortajn impulsojn. Kiujn novajn celojn oni ataku nun?

Sendube fariĝis necese, plifortigi la praktikon, la bazon. Kvankam GDREA atingis proksimume 2000 membrojn, tio neniel povis sufiĉi, krome nepris fari ankoraŭ pli por la junularo, kunlabore kun la oficiala junulara organizo en GDR. Kaj kion pri Esperanto en lernejoj kaj universitatoj? Por ion atingi tie necesis novaj paŝoj. Aparte nekontentiga estis la nesufiĉa kvanto de bonaj instruistoj. Ankaŭ la lingva nivelo de multaj membroj ne povis kontentigi. Do, en la nova etapo necesis serĉi novajn vojojn por atingi almenaŭ ion el tio, kio ankoraŭ mankas, plukonstruante sur la atingitaĵoj. Do, la 7-a periodo pro tio havis kelkajn novajn traijtojn. Ekefikis la permeso, fondi Esperanto-kursojn en universitatoj, kie ekzistas kapablaj lektoroj. Kelkaj lingvistoj kaj universitataj lektoroj, partoprenintaj la interlingvistikajn seminariojn en Ahrenshoop, tiom familiariĝis kun Esperanto, ke ili pretis instrui ĝin en la universitato. La unuaj kursoj komenciĝis en 1988. GDREA fondis lektoran grupon, por certigi la spertinterŝanĝon kaj interlingvistikan/esperantologian plikvalifikiĝon necesan por la universitata medio. En 1989 jam funkciis 8 kursoj, nome en la universitatoj en Jena, Halle, en la Teknikaj Universitatoj Karl-Marx-Stadt, Dresden kaj Magdeburg, en la Pedagogiaj Altlernejoj Leipzig kaj Magdeburg kaj en la Teknika Altlernejo Ilmenau. Por la aŭtuna semestro 1990 estas anoncita kurso en Humboldt-Universitato de Berlin.

Krom tio la ministro por altlernejoj kaj faklernejoj nomumis *d-ron sc. D. Blanke* la unuan de februaro 1988 „honoraria docento por interlingvistiko" en Humboldt-Universitato. Tio estis, post la forpaso de *doc. Istvan Szerdahelyi,* la sola docenteco pri interlingvistiko en la mondo. Blanke antaŭe estis akirinta la universitatan instrukapablon (Facultas docendi) kaj tiel disponis pri ĉiuj universitataj necesoj instali novan fakon. Dum la aŭtuna semestro de 1988 kaj la printempa de 1989 li prezentis prelegseriojn pri interlingvistiko kaj planlingvoj. Por la estonteco necesas ekspluati tiun pozicion kaj ankaŭ utiligi por la disvastigo de universitatnivela instruado de Esperanto. Ĉi-rilate tre grava estas la projekto de universitata esperantlingva lernolibro de Esperanto, preparata de la lingvistoj *d-roj Sabine Fiedler* (Leipzig) kaj *Hans-Jürgen Mattusch* (Halle) kaj kontraktita kun la eldonejo Enzyklopädie-Verlag Leipzig. Alia kun la sama eldonejo kontraktita projekto estas iuspeca lingva enciklopedio de Esperanto, verkata de *d-rino Sabine Fiedler* kaj *Ulrich Becker,* same plene esperantlingva kaj pro tio, kiel la universitata lernolibro, utiligebla tutmonde.

Dum 1988 prepariĝis ekzamena materialo por la „ekzameno pri lingva kapablo I", laŭ la ŝtataj normoj por aliaj fremdlingvoj; laŭ tio, sub gvido de *d-ro Till Dahlenburg,* ekzameniĝis 1988 kaj 1989 pli ol 30 personoj („de" 150/1988; 157/1989). Ankaŭ la junularo plivigliĝis. Kulmina aranĝo de la junularo estis la tre programriĉa kaj multflanka 1-a Centra Junulara Renkontiĝo en Biesenthal (3.–6.10.1988), kiun partoprenis entute 160 junuloj, inter ili 54 eksterlandanoj („de" 152/1988).

Entute la junulara agado fariĝis konsiderinde pli profilhava. Al tio ankaŭ kontribuis la internacia junulara seminario en Bad Saarow (30.3.–4.4.89), kiu estis grava spertinterŝanĝejo, aparte por gejunuloj el orienteŭropaj landoj („de" 156/1989). La Junulara Sekcio aktive partoprenis diversajn tutlandajn manifestaciojn (i. a. la jungularan pentekostan renkontiĝon en

Berlin) kaj nodis bonajn rilatojn al la Libera Germana Junularo (FDJ), kio i. a. ebligis al unu junulo *(Ulrich Becker)* partopreni la Mondan Festivalon de la Junularo kaj Studentoj en Pjengjang/Norda Koreujo („de" 158/1989). En la sama jaro ankaŭ okazis internacia strategia seminario sub la aŭspicio de UEA en Ahrenshoop (5.–10. 12. 1988) sub la kadra temo „Sojle al la dua jarcento – lingvo kaj parolantaro – kion konservi, kion ŝanĝi?". Inter la partoprenintoj estis la vicprezidanto de UEA *Yosimi Umeda* (Japanio), la ĝenerala direktoro de UEA, *Simo Milojevič* (Nederlando), la prezidanto de la Akademio de Esperanto *d-ro André Albault* (Francio), la prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj *Edward Symoens* (Belgio) kaj la reprezentantino de la Internacia Informa Centro por Terminologio el Vieno (Infoterm), *Regina Thaller* (Aŭstrio). La seminario akceptis kelkajn vere gravajn rekomendojn por la estonta agado de UEA („de" 154/1989). Por atingi pli da interesigeblaj homoj por Esperanto, aparte tie, kie ankoraŭ ne ekzistas grupoj, GDREA ekfunkciigis komence de 1988 korespondan kurson, sub gvido de *Ulrich Becker*, kiu rapide fariĝis tre sukcesa. Ĝis fino de 1989 aliĝis pli ol 1.000 personoj, de kiuj kompreneble ne ĉiuj restis. Tamen, evidentiĝis tute klare, ke koresponda kurso estas tre efika vojo por konsiderinde pligrandigi la nombron de esperantistoj („de" 154/1989).

Kiel fakaj materialoj en 1989 aperis la dua eldono de la germanlingva gramatiko de *Hermann Göhl* kaj oftecvortaro de Esperanto de *Hans-Joachim Dietze* („de" 158/1989). Jam en la jaro 1988 Kulturligo sukcesis atingi ĉe la Ministerio pri internaj aferoj, ke fakuloj el la diversaj kampoj de Kulturligo havu plifaciligon por ricevi vojaĝpermeson okcidentlanden al fakaj aranĝoj. Tio ankaŭ validis por la esperantistoj. GDREA tuj kaptis tiun eblecon kaj tiel atingis, ke per la helpo de Kulturligo jam la 73-an Universalan Kongreson en Rotterdam (1988) krom la du oficialaj delegitoj ankaŭ aliaj 6 membroj de GDREA partoprenis ricevinte la elvojaĝpermeson, inter ili 3 pensiuloj. La 74-an UK en Brighton partoprenis laŭ tiu vojo 3 personoj kaj la IFEF-kongresojn 1988 (Perpignan, Francio) kaj 1989 (Salon, Hispanio) 3 personoj. La KELI-kongresojn 1985 kaj 1989 laŭ tiu vojo partoprenis unu persono, same 1 persono ĉeestis en 1989 la ILEI-kongreson en Caerleon/Britio. La TEJO-Kongreson en 1989 en Kerkrade/Nederlando krom la „oficiala junulo" pro subteno flanke de Kulturligo povis partopreni 3 pliaj junuloj. Dum la jaroj 1987–1989 Kulturligo pro aparta kontrakto kun la ŝtata banko ebligis al pliaj 80 personoj la venkon de la valuta bariero al orienteŭropaj landoj, por kiuj la ŝanĝeblecoj de mono ankaŭ estis limigitaj („de" 158/1989). Tio estis nur unu malgranda avantaĝo, kiun GDREA ĝuis estante organizaĵo sub la tegmento de Kulturligo. Al la grandaj atingoj de 1988 ankaŭ apartenis, ke finfine la 20-jaraj klopodoj por ricevo de permeso dungi duan fakoficiston sukcesis: Ekde septembro 1988 eklaboris en la oficejo de GDREA juna kaj talenta esperantisto, la instruisto por fremdaj lingvoj (rusa + franca) *Ulrich Becker*. Krome dungiĝis la tria sekretariino. Jen pri la sekretariinoj: De 1965–1982 en la oficejo laboris *Ilse Serowy*. Ekde 1972 ĝis 1989 la dua sekretariino estis *Ruth Schonert*. De 1983 ĝis septembro 1990 laboris *Sylvia Lassika* kaj de 1988 ĝis 1989 *Susann Velarde*. Do 1988/89 la oficejo entute havis 5 oficistojn. Necesas ĉi tie substreki la tre gravan kaj diligentan laboron, kiun faris ĝuste tiuj sekretariinoj.

Revene al la vojaĝeblecoj oni ja esperis pri pluaj plifaciligoj. Ke ili, tamen, venis tiom rapidege, verŝajne neniu antaŭvidis. Kiel konate dum la printempo, somero kaj aŭtuno 1989 komenciĝis grandega fuĝado de GDR-anoj, unue pere de la okcidentgermana reprezentejo en GDR kaj aliaj FRG-aj ambasadejoj, en ĈSSR, Hungario kaj Pollando, poste tra la limoj inter Hungario – Aŭstrio – FRG. En Leipzig, Dresden, Berlin, Karl-Marx-Stadt kaj aliaj urboj okazis grandaj demonstracioj. La 18-an de oktobro 1989 Erich Honecker kaj aliaj membroj de la politburoo de la reginta partio perdis la potencon. La 4-an de novembro 1989 okazis la plej granda demonstracio en la historio de GDR en Berlin (duona miliono da homoj). Oni postulis drastajn sociajn ŝanĝojn, ankoraŭ kun la postulo de „humanisma" kaj „moderna socialismo". La 7-an de novembro la registaro abdikis. Dum le nokto de la 9-a al 10-a de novembro la Muro estis malfermita. Ekde tiu momento la evoluo ekgalopis. Se ankoraŭ dum oktobro kaj novembro 1989 la demonstracianoj skandis „Ni estas **la** popolo", post la malfermo de la muro kaj entute de la intergermana limo kaj la tiel subite ebla kolosa kontaktiĝo kun okcidentgermanoj, la skandoj de la demonstracianoj en GDR ŝanĝiĝis al „Ni estas **unu** popolo". Evidente la direkto de la evoluo iris al unuiĝo de la germana popolo, kvankam pli dezirita de GDR al FRG ol inverse.

Dum sia plenkunsido la Centra Estraro de GDREA en Karl-Marx-Stadt (2.–4. 11. 1989) klopodis el tiu evoluo konkludi por la estonta agado de GDREA. Tamen, la evoluo tiom rapidiĝis kaj akceliĝis, ke la esperoj pri reformota GDR fariĝis vanaj kaj konkludoj malfacilaj. Do, ankaŭ GDREA devis kutimiĝi al penso pri unuiĝo kun Germana Esperanto-Asocio. Dum novembro 1989 la aŭtoro verkis la artikolon „GDREA en alia lando" („de" 159/1990) por provi esprimi siajn pensojn en la kirliĝanta socio. Siatempe li ankoraŭ supozis, ke per reformoj oni povus savi GDR. Kiam finfine la kajero estis aperinta dum marto 1990, la situacio estis komplete ŝanĝiĝinta. Post la balotoj de la 18-a de marto 1990 fariĝis klare, ke GDR malaperos, ĝi unuiĝos kun (aŭ pli bone: estos alnajlata al) FRG. Kaj estis rimarkleble, ke tiu „unuiĝo" ne iros laŭpaŝe kaj iom laŭorde, sed ke ĝi fariĝos hasta kaj blinda galopado. Ĉiukaze GDREA devis kaj klopodis adaptiĝi al tiu procezo, sen, tamen, perdi sian dignon. Dum sia plenkunsido la Centra Estraro de GDREA, la 19-an de januaro 1990 en Neubrandenburg, per tute demokrata procedo elektis novan prezidion. El inter tri kandidatoj (*Hans Heinel*, kiu pro malsano malĉeestis, *Manfred Arnold* kaj *d-ro Ronald Lötzsch*) de entute 36 voĉoj 22 ricevis la lingvisto *d-ro Ronald Lötzsch* kaj tiel fariĝis post *Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm* kaj *Hans Heinel* la kvara prezidanto en la historio de la 25-jara organizita Esperanto-movado de GDR. El listo de 10 personoj (unua baloto) kaj 4 personoj (dua baloto por unu tasko) elektiĝis 6 pliaj membroj de la prezidio. Ili estis *Manfred Arnold* kaj *Joachim Schulze* kiel vicprezidantoj, *d-ro Detlev Blanke* kiel sekretario (kiu ricevis 35 voĉojn de 36 eblaj) kaj *Werner Pfennig, Ulrich Becker* kaj *Detlef Kraus* („de" 159/1990). Bedaŭrinde pro personaj kialoj *Joachim Schulze* baldaŭ retiriĝis. *D-ro Lötzsch* estas kaj en GDR kaj eksterlande reputacia lingvisto, slavisto. Li estis la ĉefo de aŭtora kolektivo por la trivoluma plej granda akademia vortaro Germana-Rusa. Krome aperis el lia plumo jida-germana vortaro kaj multaj studoj pri lingvopolitikaj kaj gramatikaj demandoj. *Lötzsch* fakte eklernis Esperanton kiel lernejano kaj nur antaŭnelonge revivigis la parolkapablon. Post la foriro de la lingvisto prof. d-ro *Georg Friedrich Meier* al Munkeno, meze de la 80-aj jaroj, *Lötzsch* tre helpis al la sukceso de la lastaj interlingvistikaj seminarioj en Ahrenshoop. Krome li, vicĉefredaktoro de la gvida lingvistika revuo en GDR („Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung") ebligis aperigon de diversaj materialoj en tiu revuo same, kiel antaŭe tion ebli-

gis la iama ĉefredaktoro prof. *Georg Friedrich Meier* („de" 124/1989). Krom tio *Lötzsch* estas homo, kiu pruvis sian kontraŭstaron kontraŭ stalinismaj trajtoj de la reĝimo en GDR kaj pro tio pasigis 3 jarojn en prizono (kp. „de" 162/1990). Per la elekto de la nova prezidanto kaj prezidio de GDREA, farita cetere la unuan fojon vere plendemokrate kaj absolute sekrete, finiĝis la 7-a periodo en la historio de CLE/GDREA.

2.8. De januaro 1990 ĝis majo[?] 1991: De la januara baloto ĝis la unuiĝo kun GEA

Ni nun, dum oktobro 1990, kiam estas finredaktita ĉi tiu skizo, kompreneble ne povas precize antaŭvidi la finon de ĉi tiu 8-a periodo. Sed ni provos. La 23-an/24-an de marto 1990 Kulturligo dum eksterordinara kongreso en Potsdam elektis tute novan estraron kaj draste ŝanĝis sian gvidstrukturon. Jam dum la unuaj monatoj, kaj aparte nun fariĝis klare, ke la tempo de la ŝtata subvencio por Kulturligo finiĝis. Sed oni ne povis antaŭvidi, ke ĝi tiom rapide kaj komplete finiĝos. La registaro – malgraŭ promesoj – ekde julio ne plu donis subvencion en la modeste necesa alteco. Jam ekde januaro ĉ. 40 % de la oficistoj de Kulturligo devis esti maldungitaj. Kaj ni nun scias, ke ekde la 1-a de novembro 1990 de iam 5 oficistoj restos nur la aŭtoro. La aliaj devis esti maldungitaj pro monmanko. Kaj ekde januaro 1991 ankaŭ la aŭtoro ne plu estos dungita de Kulturligo.

Sed ni revenu al la donitaĵoj pri la 8-a periodo. La 4-an de marto 1990 en Berlin okazis la unua oficiala interparolo inter prezidianoj de GDREA kaj rajtigitoj de la prezidio de GEA (*d-ro Rudolf Fischer + edzino, Ina Tautorat* kaj *Ronald Schnell* („de" 160/1990). La 5-an Centran Renkontiĝon de GDREA en Brandenburg ankaŭ partoprenis oficiale la prezidanto de GEA *d-ro Wolfgang Schwanzer, d-ro Rudolf Fischer* (redaktoro de „Esperanto aktuell", la organo de GEA) kaj la eksprezidanto de GEA *Helmut Klünder*. Ili havis larĝajn eblecojn konatiĝi kun GDREA kaj konatigi GEA al la partoprenintoj de la Centra Renkontiĝo. Oficiala delegitaro de GDREA *(d-roj Lötzsch kaj Blanke)* partoprenis la 68-an Germanan Esperanto-kongreson de la 1-a ĝis 4-a de junio 1990 en Freiburg kaj tie daŭrigis la kontaktojn. En Berlin la du movadoj jam vigle interkontaktadis ekde la falo de la muro. Kaj okazis pluaj kontaktoj inter GDREA kaj GEA kun la celo de harmonia kaj ambaŭorganize utila unuiĝo de ambaŭ movadoj al tutgermana, ekz. 1./2.9.1990 en Erfurt kaj kadre de la dulanda renkontiĝo en Hof (19.–21.10.90).

Ĉu oni trovos utilan modelon, montros la estonteco. Ĉiu hasto nur povas malutili, perdigi membrojn kaj detrui strukturojn. Al la bedaŭrindaj perdoj dum ĉi tiu periodo apartenas la malapero de la utila kaj lerte redaktita „Saksa Kuriero". *Joachim Schulze* ne pretis daŭrigi la redaktadon. Al la pozitivaĵoj apartenas la tre sukcesa internacia seminario „Esperanto – objekto de akademia esploro kaj instruado", en Bad Saarow (27.4.–2.5.90), kiun partoprenis 37 fakuloj el 7 landoj („de" 162/1990). La 5-a Centra Renkontiĝo de GDREA, 25.–27.5.1990 en Brandenburg, estis forta kuraĝigo por la movado en GDR kaj montris, ke GDREA vivas kaj funkcias, malgraŭ la ŝanĝita situacio. Partoprenis 160 esperantistoj el GDR kaj 50 eksterlandanoj (el Pollando, Mongolio, Litovio, Hungario, Nederlando, Rusio, Usono), krome el FRG Ĉiuj vigle debatis, aŭskultis prelegojn, partoprenis kulturajn aranĝojn kaj ekskursis („de" 162/1990). De iuj prognozita disfalo de GDREA nek estis observebla dum tiu granda aranĝo nek en la distriktoj, subdistriktoj aŭ grupoj. Same apenaŭ oni registris perdon de membroj (kvankam ja kelkaj forlasis nin). Ankaŭ la emo forlasi Kulturligon estis minimuma. Ni menciu ankaŭ alian tre kuraĝigan sintenon de multaj membroj:

Pro la subita minaco de subvencimanko, la Centra Estraro de GDREA alvokis por mondonacoj, la unuan fojon dum 25 jaroj. Dum nur 4 monatoj alvenis pli ol 20.000 orientgermanaj markoj, kiuj pro la monŝanĝo post la 1-a de julio 1990 fariĝis 10.000 (okcident)germanaj markoj. Eventuale tiu sumo ebligos, ke vi legos ĉi tiun numeron de „der esperantist" kp. „de" 160/1990 + 162/1990). Dum tiu 8-a periodo de Esperanto-movado eĉ certagrade fariĝis pli agokapabla en neatendita maniero: La junaj esperantistoj dum la lastaj jaroj tiom ekviglis kaj iniciatemis, ke estiĝis la bazo por fondi memstaran organizaĵon. La 17-an de aprilo 1990 en Berlin fondiĝis „La Esperanto-Junularo (GDR)". Ĝia ĉefoficisto fariĝis la 18-jara Adrian Bourcevet. Al la ĉefaj junaj aktivuloj krome apartenas (resp. apartenis) ankaŭ Torsten Bendias, Sandra Kienast, Detlef Kraus, Detlef Raabe, Heidi Schiller kaj Uwe Weiß. Tiu iniciatema organizaĵo eĉ sukcesis eksidi ĉe la „Ronda Tablo de la Junularo" kaj ricevis oficejajn salonojn en la iama ĉefsidejo de la „Libera Germana Junularo" (FDJ) en Berlin. Intertempe, tamen, la sorto de la „Esperanto-Junularo" ankaŭ fariĝis tre necerta. Ankaŭ la fondo de la privata „Esperanto-Centro Halle" (Hans-Peter Bartos), kiu estas turisma kaj kleriga centro, apartenas al la novaĵoj de la 8-a periodo. Dum aŭgusto (18.–24.8.90) okazis denove SEFT.

Dum sia 7-a plenkunsido la Centra Estraro de GDREA (12.5.1990) en Woltersdorf ŝanĝis la nomon de la asocio. Ĉar Kulturligo de GDR dum marto 1990 fariĝis „Kulturligo r.s." (r.s. = registrita societo), GDREA novnomis sin „Esperanto-Asocio de GDR en Kulturligo r.s.". Sed apenaŭ sufiĉis la tempo por havi novan stampilon, GDREA denove devis ŝanĝi sian nomon. La 3-an de oktobro 1990 malaperis GDR.

Ĉu post la malapero de GDR povos pluekzisti GDREA? Nu ankaŭ „Deutsche Reichsbahn" (Germana Regna Fervojo) ekzistis (kaj ankoraŭ ekzistas), kvankam la „Deutsches" Reich (Germana Regno) vere jam longe malaperis. La prezidio de GDREA pensis pri kompromiso. La asocio nomiĝu „Esperanto-Asocio en Kulturligo/GDREA", ĉar ja la mallongigo GDREA jam estas internacie konata. En „de" 162/1990 ni ankoraŭ konsideris la fondon de Orientgermana Esperanto-Asocio. Sed ĉar intertempe la paŝoj al la unuiĝo kun GEA jam fariĝis pli klaraj, ne necesas tiu novfondiĝo. Ambaŭ prezidioj, feliĉe tute kontraŭe al la registaroj de la eksa GDR kaj FRG, ne pensis pri reciproka gluto sed pri unuiĝo de samrajtaj partneroj. Rezulte de la prezidiaj traktadoj por la estonteco de GDREA prezentiĝos jenaj etapoj al la unuiĝo kun GEA: La 10-an de novembro 1990 la Centra Estraro de GDREA havos en Berlin sian lastan kunsidon kaj decidos pri principaj problemoj de la unuiĝo kaj pri konferenco de GDREA, kiu okazos la 15-an de decembro 1990, ankaŭ en Berlin. Fakte nur tiu konferenco, kun reprezentantoj de la grupoj de GDREA kaj ĉiuj membroj, kiuj volas partopreni, rajtas decidi pri la unuiĝo, pri nova statuto de GDREA, pri la statuto de la tutgermana asocio kaj simile.

Ĝi ankaŭ elektos novan prezidion, kiu estos iom pli ampleksa ol la nuna kaj anstataŭos la ĝisnunan (47-kapan) Centran Estraron. Inter januaro kaj majo 1991 la prezidioj de GEA kaj GDREA plutraktados pri principaj kaj detalaj demandoj de la unuiĝo kiu eble okazos kadre de la 69a Germana Esperanto-Kongreso (17.–20.5.1991) en Munkeno. Tiu nova asocio aŭ konservos la tradician nomon Germana Esperanto-Asocio aŭ havos novan. Ĉiukaze tiu asocio havos novan statuton kaj ĝi markos novan tre gravan etapon en la historio de la germana

Esperanto-movado. Tamen, la unuiĝo mem en Munkeno ja nur estas formala paŝo. Nun necesas la kunkreskado, kiom eble harmonie. Ja tro malsamaj estas la tradicioj, spertoj, specifaĵoj. Sed tiu malsameco estu komprenata kiel ŝanco al reciproka kompletigo. Ĉiu lernu de la alia, kunlaboreme kaj malarogante.

Intertempe sur la teritorio de eks-GDR jam fondiĝis kelkaj federacilandaj asocioj:en Turingio (prezidanto: Hans-Jürg Kelpin). Meklenburgo/Antaŭpomerio (prez.: Werner Pfennig), Saksio (prez.: d-ro Erich-Dieter Krause), Saksio/Anhaltio (prez.: an koraŭ vakas). Fine de oktobro fondiĝis la asocio en Brandenburgio. La berlinanoj devos trovi apartan solvon kaj certe unuiĝos pli rapide ol la asocioj mem. „der esperantist" en 1991 ne plu aperos. Sed estas planite, eldoni „Cirkuleron de GDREA" por informi la aktivulojn pri ĉio grava ĝis la unuiĝo de la asocioj.

En 1991 GDREA ne plu estos membro de UEA, ĉar laŭ la statuto de UEA el unu lando povas esti membro nur unu asocio.

Jen, en tiu 8-a etapo jam troviĝas multo planita. Ĉu ĉio evoluos ĝuste tiel, kiel skizite, montros la estonteco.

3. Kelkaj aliaj aspektoj

Ni priskribis la esencon de la 8 periodoj de la historio de Esperanto post la dua mondmilito, precipe sur la teritorio de GDR. Certe multo restas netraktita. Tamen ni volas doni ankoraŭ kelkajn pliajn informojn pri Kulturligo mem, la financoj kaj la rolo de la Centra Estraro.

3.1. La pozicio de Esperanto en Kulturligo

Ni jam kelkloke menciis la tegmenton de la esperantistoj. Dum la unuaj jaroj de la ekzisto de CLE al multaj esperantistoj ne estis klare, ĉu Kulturligo vere estos bona tegmento. Ĉu tute memstara organizaĵo ne estus preferinda? Ĉiukaze estas vero, ke la partiaj kaj ŝtataj organoj, kiam ili devis decidi pri la estonteco de Esperanto en GDR, neniel volis permesi memstaran organizaĵon, certe pro nemalgranda malfido, almenaŭ dum la unua tempo. Oni konsideris la Germanan Packonsilantaron kaj la Ligon por Popola Amikeco. Sed ambaŭ organizaĵoj ne disponis pri enlanda strukturo kaj nur efikis sur respublika ebeno. Kulturligo jam estis tre multflanka kaj bunta organizaĵo kaj disponis pri bone strukturita organizareto, tuj utiligebla por nova interesa kampo kiel Esperanto. Krom tio, kiel menciite, ja post 1945 kelkaj esperantistoj jam estis organizintaj grupojn en Kulturligo. Do aliĝo al KL donis tujan starto-helpon: monon, oficejon, oficistojn, klubojn kaj prestiĝon. Oni devas scii, ke KL estis la plej granda kulturorganizaĵo en GDR kaj havis deputitojn en la Parlamento. Dose iu ajn grupo agadas **en** Kulturligo, do kadre de prestiĝa organizaĵo, tiu grupo ne povas esti tute neserioza. La reputacian kadron la esperantistoj bone eluzis. Kompreneble, dum la unuaj jaroj diversaj funkciuloj de Kulturligo ne estis tre entuziasmaj pri la hobiuloj kun sia verda lingvo, kiun tiuj funkciuloj ne konis. Sed dum la paso de la jaroj ĉi-rilate multo ŝanĝiĝis. En la ĉefoficejo en Berlin evidente la 1-a ĉefsekretario de KL, prezidanto de la Kulturliga Frakcio en la Parlamento, *prof. d-ro Karl-Heinz Schulmeister*, rapide fariĝis amiko de la esperantistoj. Tio efikis pozitive al multaj decidoprojektoj. Ankaŭ en la distriktaj estraroj (kaj sekretariejoj) de Kulturligo okazis simila evoluo. Kompreneble ne en ĉiuj distriktoj. Oni ankaŭ sincere agnosku, ke diversaj esperantistoj ne ĉiam saĝe kondutis, estis sektecaj (konata fenomeno en la movado). Tio ne helpis. Sed ankaŭ ekzistas ekzemploj, ke pagitaj oficistoj en Kulturligo, sur distrikta ebeno por Esperanto kunrespondecaj, tiom ekŝatis Esperanton, ke ili faris pli por Esperanto ol la honoroficaj esperantistaj funkciuloj mem.

Alia avantaĝo de Kulturligo estis ĝia intelekta komponanto. En la gvidorganoj agis multaj famaj intelektuloj. Tio tre helpis al la elformado de intelektaj komponantoj de CLE/GDREA. Krom tio, la estro de la sekcio Esperanto (= sekretario de CLE/GDREA) neniam estis izolita. Li estis samrajta membro en la kolegio de la alifakaj sekciestroj. Iom post iom la sekcio gajnis prestiĝon simple pro la fakto, ke ĝi havis pli da internaciaj spertoj ol aliaj fakoj, aŭ almenaŭ samajn. Kompare al la alia dua asocio (la filatelistoj) GDREA estis tre eta. La Filatelia Asocio havis 60.000 membrojn. La Societo pri Naturo kaj Homa Medio 40.000, la Societo pri Numismatiko 20.000 k. s. Kaj tamen GDREA havis same bonajn kondiĉojn, kompare al la pli grandaj asocioj, eĉ pli bonajn. Ofte en eksterlando oni pridubis la memstarecon de GDREA en KL. Nu, tiu memstareco estis relativa. Tamen, la alta specifeco de la objekto donis relative grandan moveblecon. Per 2–3 grandaj decidoj unufoje dum la jaro la sekretariato de Kulturligo donis al GDREA „verdan lumon" por la agado dum la tuta jaro. Se anoraŭ dum la unuaj 2–3 jaroj (1965–1968) oni postulis la germanlingvan tradukon por „Paco" kaj „der esperantist", tio baldaŭ ĉesis. Neniu demandis pri la enhavo. CLE kaj la Centra Estraro de GDREA simple ĝuis fidon. Dum la 70-aj jaroj ankoraŭ necesis diversaj permesoj de la Centra Komitato de la reginta partio kaj flanke de la registaro, ekz. por partoprenoj en la universalaj kongresoj. Tio ĉesis fine de la 70-aj jaroj. Ĉion Kulturligo mem decidis. Nur pro la eniro de okcidentanoj en GDR la Centra Komitato volis esti konsultita. Stranga zorgo, sed neevitebla. Krom tio oni konsciu, ke la publikigo de eksterlandaj adresoj en GDR-aj materialoj ne estis kutima. Kaj tamen, dum 25 jaroj GDREA publikigis tute senĝene ĉion. Do – la memstareco de GDREA estis vere relative alta, kvankam ne absoluta.

3.2. Financoj

La 1500–2000 membroj pagis tiom malmulte da kotizoj (0,50–3,00 orientgermanaj markoj monate), ke per tiu mono oni eĉ ne povintus eldoni la ĉiam deficitan „der esperantist". CLE kaj GDREA havis memstaran buĝeton. La monon oni planis somere de la antaŭa jaro kaj ricevis la konfirmon (aŭ la redukton) fine de la jaro tiel, ke oni povis labori dum la sekva jaro surbaze de la konfirmita financa plano. Jen pri la financoj dum la plej bona periodo (1987/88: en nova oficejo, kun 5 oficistoj):

1. 85.000 M por ĝenerala buĝeto (faka laboro, aranĝoj, „der esperantist", „Paco" ktp.). De tio sole „der esperantist" formanĝis 30.000 kaj la GDR-eldono de „Paco 18.000 markojn.
2. Salajroj: 80.000
3. Aparta Buĝeto por vojaĝoj (valutoj de orientaj kaj okcidentaj landoj transkalkulitaj al „valuto-markoj") + veturkostoj: 15.000 M.
4. Aparta buĝeto por kvalifikado (seminarioj): 15.000 M
5. Luado de la oficejo: 8.000 M
6. Telefono, afranko k. a. teknikaj elspezoj ne inkluditaj en la buĝeto 1: 10.000 M
7. Oficvojaĝoj en GDR: 2.000 M
8. Mebloj por la oficejo: 15.000 M
9. 15 buĝetetoj por Esperanto kadre de la distriktaj eŝtraroj en 15 distriktoj, sume ĉirkaŭ 30000 M. Do sume 260000 markoj. Jen la faktoj. Ni ne volas esplori ĉi tie, ĉu GDREA sufiĉe ŝpareme utiligis la monon. Ĉiukaze la asocio klopodis tion fari kaj bonfartis. Limigoj tamen ekzistis: La tuta

sistemo ne provokis memstaran iniciatemon por akiri aldonajn finacojn. Eĉ se tio estus fariĝinta ebla, ekz. por eldoni „der esperantist" pli ofte, aŭ pli lukse, aŭ en alia formato. Jam la katastrofa nivelo de la poligrafia industrio en GDR estus detruinta ĉiun ajn iniciatemon ĉi-direkte. Enspezojn, cetere, GDREA ankaŭ havis (ekz. pro vendado de libroj k.s.). Sed tiujn enspezojn oni devis doni al KL. GDREA ne mem povis mastrumi per tiu mono. Tio estis facile komprenebla. La enspezoj estis tiom ridindaj kompare al la ricevitaj buĝetoj, ke oni ne povis postuli la retenon de la enspezita mono. Tio, kompreneble, ne vekis la emon havigi multajn enspezojn. Do – jen malgranda reflekto de la foje iel bonfartiga sed ja malekonomia sistemo, kiu regis en GDR.

3.3. La gvidorganoj

Ĉar regis la centrisma gvidpiramido, la centro, do Centra Laborrondo, kaj poste, la Centra Estraro de GDREA, ja havis influon al la tuta esperantista agado en GDR. Tamen, la kolektivo ĉiam klopodis helpi, stimuli kaj limigi sin al strategiaj aspektoj kaj ne enmiksiĝi en detalojn. La Distriktaj Laborrondoj (poste: Distriktaj Estraroj) estis altgrade memstaraj. Pli da influo al la distrikta agado havis la distriktaj estraroj de Kulturligo ol la prezidio de GDREA aŭ ties sekretario. Tamen, oni ja respektis la fakulojn en Berlin, kaj pro tio fojfoje konsiloj el Berlin povis helpi aŭ entute ebligis difinitan agadon. Komparante la gvidagadon de la Centra Estraro de GDREA kun tiu de la Komitato de UEA, tuj farigâs klara grava diferenco. Ĉe GDREA oni malmulte voĉdonis. La tagordaj punktoj servis al la trakto de strategie gravaj aferoj, por kapabligi la estraranojn agadi en siaj distriktoj, fakaj grupoj k.s. Pro certa manko de materialoj (la revuon de UEA kaj aliajn materialojn ja ne havis ĉiuj el la ĉ. 50 estraranoj) oni ankaŭ tre multe informis pri la internacia movado, pri difinitaj aspektoj, aranĝoj k.s. En CLE kaj en la Centra Estraro de GDREA regis bona klimato, harmonia etoso. Partianoj, senpartiuloj, kristanoj (ankaŭ unu pastro) havis la saman celon, antaŭenigi Esperanton. Kaj tiu celo kunligis. Aliflanke tio ne signifas, ke la kunsidoj estis sekaj aŭ malviglaj. Tute kontraŭe. Legitaj sekaj kaj enuaj referaĵoj komplete mankis. Ĉiam regis demokratia diskutiga atmosfero. Sed oni ja devas diri, ke la membroj nur malofte voĉdonis. En tiu senco la reguloj de la demokratio ne funkciis. Ĉi-rilate oni devis lerni sen sufoki kreivan laboron en formalaĵoj. CLE dum la unuaj jaroj 2–3foje jare kunvenis por unutagaj kunsidoj. Baldaŭ montriĝis, ke tio ne sufiĉas; komence de la 70-aj jaroj fariĝis regulo, ke CLE (kaj ekde 1981 la Centra Estraro de GDREA) kunvenis 3-foje jare por plenaj unutagaj kunsidoj. Tio signifas: matene ekde la 8-a ĝis vespero. Oni sekve alveturis la antaŭan vesperon kaj forvojaĝis la postkunsidan matenon. La prezidio de CLE, respektive de GDREA, konsistis el 6–8 personoj. La prezidio kunsidis ĝenerale ĉiun duan monaton. La fakgrupoj havis proprajn estrarojn. La membrojn de la Centra Estraro (ekde 1972) oni elektis per sekreta voĉdono kadre de la Centraj Konferencoj. Manko tamen estis, ke ne kandidatiĝis pli ol estis lokoj por elektatoj. La Prezidio mem fakte estis proponita al la Centra Estraro kaj ĝenerale akceptita. Tio ne estis tre demokratia. Kaj ni ŝanĝis tion dum januaro 1990.

4. Mankoj

Ĉiam estas la danĝero tro multe skribi pri sukcesoj. Pro tio ni simple listigu kelkajn ĉefajn mankojn, kiel ili evidentiĝis dum la 25-jara agado:

4.1. Jam ofte menciita: manko de vojaĝeblecoj al okcidentaj landoj. Pri tio tamen ne kulpis la esperantistoj.

4.2. Tro unuflanka evoluigo de la internaciaj rilatoj al la orienteŭropaj landoj: Sed tio estas klarigebla el la politika situacio, la certa izoliĝo de GDR kaj el punkto 4.1. Krome la movado en la orientaj landoj estis la plej forta.

4.3. Fakte preskaŭ mankis Esperanto-turismo ĉe GDREA. Proponojn, ekz. el Pollando, Hungario kaj Bulgario pri sendeviza interŝanĝo GDREA apenaŭ akceptis, ĉar mankis sufiĉe da ekvivalentaj aranĝoj en GDR.

4.4. Do kiel menciite sub 4.3. tro malmultis la internaciaj aranĝoj en GDR. Ekzemple neniam ni sukcesis realigi la planon pri konstanta Somera Esperanto-Lernejo (Kiel ekz. en Ĉeĥio, Slovakio aŭ Bulgario).

4.5. Neniam sufiĉis talentaj homoj, ne nur talentaj sed ankaŭ pretaj transpreni gvidfunkciojn en la asocio. Tio negative efikis al la grupoj, kiuj ofte estis tro malfortaj. Tro ofte ĉio dependis nur de 1–2 personoj.

4.6. La meza lingva nivelo de la membroj de GDREA ne estis tro alta, eble pro la nesufiĉaj vojaĝeblecoj, kvankam vojaĝi al amikoj kaj aranĝoj en la orientaj landoj ja eblis, kvankam dum la lastaj jaroj eĉ tio nur kun malfacilaĵoj.

4.7. Mankis sufiĉe da vere bonaj kursgvidantoj.

4.8. Neniam sufiĉis al GDREA bonaj fakuloj, kiuj povus agadi en la fakaplika sfero, skribi diverstipajn lernolibrojn aŭ simile. Pro tio la asocio en diversaj sferoj tro dependis de la eblecoj, kiujn pretigis unuopuloj.

4.9. Absolute nesufiĉa estis la libroeldonado, aparte pro konstanta papermanko kaj aliaj malhelpaĵoj. Ĉi-rilate ĉiuj aliaj konataj orienteŭropaj asocioj ŝajne havis pli da rezultoj ol GDREA.

4.10. La membro-nombro tre malrapide kreskis. Ĉar GDREA ne disponis pri centra membro-administrado sed ĉiam dependis de la informoj ricevitaj de la distriktaj estraroj, la membro-nombro neniam estis precize konata. Tamen, la verŝajne relative ĝusta nombro de ĉ. 2000 (por 1989) neniel povas kontentigi.

4.11. Granda manko estis la preskaŭ konstanta malfruiĝo de „der esperantist". Tio tamen estis kaŭzita de la katastrofa situacio en la preseja oferto de GDR. Ni ne havis elektojn kaj devis ĝoji pri tute malkapablaj presejoj.

4.12. Ni kelkloke jam aludis al la fakto, ke diversajn interpretojn pri la historio kaj nuno de la Esperanto-movado ne plu eblas defendi. La interpreto pri SEU kaj SAT, ekzemple, estis malĝusta aŭ almenaŭ unuflanka. Sed tion ni konscias nur nun. Malgraŭ evidentaj rezultoj en la esplorado de la historio de GLEA oni tro subtaksis la aliajn komponantojn en la Germana Esperanto–movado.

4.13. Sufiĉe subevoluinta estis la praktika kultura agado. Ne ekzistis koruso, teatra grupo aŭ io simila. Klopodoj ĉi-rilate neniam longe efikis.

4.14. Kaj grandega manko: Dum la 25 jaroj de organizita agado de la esperantistoj en GDR sukcesis aranĝi nek TEJO-Kongreson nek Universalan Kongreson de Esperanto.

4.15. Finfine: Pri ideologia komponanto en diversaj eldonaĵoj de GDREA oni hodiaŭ, kompreneble, devas distance taksi kaj kritiki.

Nu jen. Certe oni povus plilongigi la liston. Do – komparu la atingojn kun la mankoj, kaj eble vi havos iom objektivan bildon.

5. Finaj vortoj

Kiel menciite, GDREA supozeble ekzistos ĝis majo 1991. Sed jam nun la agadcirkonstancoj draste malboniĝis. Multaj aktivuloj fariĝis senlaboraj kaj havas privatajn zorgojn. Tio ne stimulas la transprenon de taskoj kaj funkcioj. Kontraste al

antaŭ unu jaro anoncoj pri la koresponda kurso en la gazetaro ne plu alportis tro grandan efiion. La buĝeto de GDREA malgrandiĝis en 1990 terure. Multaj aktivecoj simple ne plu estis subvencieblaj. Forte ŝanĝiĝis la situacio de la centra oficejo. De iam 140 oficistoj en la centra oficejo de Kulturligo en Berlin ĝis mezo de 1990 restis 80. Kaj oni daŭrigis la maldungon tiel, ke ĝis fino de 1990 nur restos eble 10. Fine de septembro estis maldungita pro monmanko la lasta sekretariino de GDREA, Sylvia Lassika. Fine de oktobro la oficejon devis forlasi Ulrich Becker. Kaj ekde januaro 1991 ankaŭ la sekretario de GDREA ne plu estos pagata de Kulturligo. La luksan oficejon en Friedrichstraße 120 ni devis forlasi dum septembro kaj ĝis fino de la jaro translokiĝis al la ĉefsidejo de KL (Otto-Nuschke-Str. 1, tel. 2202991) tie havante 1,5 ĉambrojn. Tamen, ni sukcesis solvi tre gravan problemon, almenaŭ provizore. La 2300 librojn de la biblioteko de GDREA, la multajn jarkolektojn de revuoj, la aktojn kaj dokumentaĵojn de la 25-jara agado en la centro kaj parte en la distriktoj oni sukcesis deponi en ankoraŭ posedata (sed kiom longe?) tre bone ekipita kelo. Ĉu oni povas permesi la detruiĝon aŭ malaperon de la materialo? 25 jaroj de organizita Esperanto-movado en GDR estis io rimarkinda. Ni ne devas honti pri tio. Ni alportos ion utilan al la tutgermana movado. Tre haste skribinte ĉi tiun superrigardon, kvazaŭ vetkure kun la unuiĝo, la aŭtoro konscias pri multaj mankoj, ĝeneraligoj, subjektivaj rigardoj, forgesoj, nemencioj, eble eĉ misinterpretoj. Kiel sekretario de CLE (ekde 1968) kaj de GDREA (ekde 1981) li certe ne faris ĉion ĝuste. Sed, almenaŭ li honeste klopodis, kaj eble ne tute sensukcese. Veran juĝon pri la plusoj kaj minusoj de tiu 25-jara Esperanto-movado en GDR povas doni movadaj historiistoj verŝajne nur post certa tempo, kun iom da distanco. Pri komentoj, aldonoj, kritikoj k. s. la aŭtoro estas dankema.

6. Notoj

1) La prelego baziĝis sur lia manuskripto „Beitrag zur Geschichte der Esperanto-Bewegung in der sowjetischen Besatzungszone und der DDR" 1946–1959. Auszüge aus persönlichen Tagebuchaufzeichnungen. 1985, 68 p.

2) Kp. ankaŭ *L. Schödl:* En la kvindekaj jaroj. En: Paco, eldono de GDR, Berlin 1989, p. 26–27.

3) Pri la persekutoj vidu *Ulrich Lins:* La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto: Gerlingen: Bleicher, 1988, 546 p. Ankaŭ aperis konciza germana eldono: „Die gefährliche Sprache", same en Gerlingen ĉe Bleicher, 1988, 326 p. Kp. la recenzon pri la libroj en „de" 2/1990 (160).

4) La germana teksto: „7. Kunstsprachengruppen sind aufzulösen. 8. Ido- und Esperanto-Sprachecken in den Zeitungen und Zeitschriften sind unverzüglich aufzuheben."

5) Pri tio kp. la historisciencan ŝtatekzamenan (universitatan) disertaction de *Diethelm Becker:* Der Arbeiter-Esperanto-Bund auf dem Weg zu einer revolutionären Organisation des deutschen Proletariats. Univ. Rostock (Historisches Institut), 62 p. (manuskripto) 1968

6) *Blanke, Detlev:* Der Anteil der Arbeiter-Esperantisten bei der Entwicklung der deutsch-sowjetischen Freundschaft in der Zeit der Weimarer Republik. Erfurt: Kulturbund 1971, 67 p. Koncizigita versio aperis en: Beiträge zur Geschichte der Deutschen Arbeiterbewegung, Berlin **18** (1976) 4, p. 683–690.

7) Aperis jenaj fakaj eldonaĵoj:

– *Blanke, Detlev* (Red.): Esperanto: Lingvo – movado – instruado. Berlin, Kulturbund der DDR, 1977, 187 p.

– *Blanke, Detlev* (Red.): La internacia lingvo – sciencaj aspektoj. Berlin: Kulturbund der DDR, 1979, 235 p.

– *Blanke, Detlev:* Esperanto und Wissenschaft, Berlin: Kulturbund, 1982, 88 p. (2-a eldono: 1986)

– *Dahlenburg, Till:* Begleitmaterial für Kursleiter zum „Taschenlehrbuch Esperanto" von Till Dahlenburg und Peter Liebig. Berlin: Kulturbund der DDR, 1978, 74 p. (2-a eldono: 1983)

– *Dahlenburg, Till:* Begleitmaterial zum Selbstunterricht zum „Taschenlehrbuch Esperanto" von Till Dahlenburg und Peter Liebig. Berlin: Kulturbund der DDR, 1979, 74 p. (2-a eldono 1983)

– *Göhl, Hermann:* Ausführliche Sprachlehre des Esperanto. Berlin: Zentraler Arbeitskreis Esperanto. Berlin: Kulturbund der DDR, 1973 (2-a eldono); 1989 (3-a eldono: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR), 295 p.

– *Glier, Willi/Weißbach, Willi/Müller, Alfred/Conrad, Max:* Zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im Bezirk Erzgebirge/Vogtland (1907–1933), Karl-Marx-Stadt: Kulturbund der DDR, 1976, 40 p.

– *Micheel, Harald/Schödl, Ludwig:* Ni kantas esperante 1. Berlin: Centra Laborrondo Esperanto, 1972, 24 p. (ĝi fakte aperis private en Erfurt)

– *Micheel, Harald/Schödl, Ludwig:* Ni kantas esperante 2. 1973, 28 p. (ĝi fakte aperis private en Erfurt)

– *Schödl, Ludwig:* Wir lernen Esperanto sprechen. Berlin: Kulturbund 1975

– *Schödl, Ludwig:* Ni kantas. Berlin: Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, 1980, 58 p. (2-a eldono: 1989: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR)

Krome aperis jenaj fakaj materialoj ekster CLE/GDR en Kulturligo:

– *Blanke, Detlev:* Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung. Berlin: AdW, ZI für Sprachwissenschaft, Linguistische Studien, Reihe A, Nr. 85, 1981, 162 S. (2-a eldono 1982)

– *Blanke, Detlev:* Internationale Plansprachen. Eine Einführung. Berlin: Akademie-Verlag 1985, 408 p.

– *Blanke, Detlev/Dahlenburg, Till:* Konversationsbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig: Verlag Enzyklopädie, 1990

– *Dahlenburg, Till/Liebig, Peter:* Taschenlehrbuch Esperanto. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1978 (5-a eldono 1990)

– *Dietze, Joachim:* Frequenzwörterbuch Esperanto-Deutsch. Die meistgebrauchten Wurzeln der Esperanto-Literatursprache. Wissenschaftliche Beiträge 1989/56 (F96). Halle: Martin-Luther-Universität Halle–Wittenberg, 1989, 67 p.

– *Krause, Erich-Dieter:* Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1967 (aperis la 6-a eldono en 1989), 190 p.

– *Krause, Erich-Dieter:* Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig 1971 (4-a eldono 1989)

– *Krause, Erich-Dieter:* Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1983, 594 p. (dua eldono 1990)

– *Schödl, Ludwig:* Wir lernen Esperanto sprechen. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1967

8) Kp. *Edward Symoens:* Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko. Rotterdam: UEA/CED, 1989, p. 59

10. 10. 1990 *Detlev Blanke*

Komuna letero

de la prezidantoj de GEA kaj GDREA, d-roj Wolfgang Schwanzer
kaj Ronald Lötzsch

Karaj gesamideanoj!

Okazis kaj okazadas gravegaj sociaj ŝanĝoj en Eŭropo. Unuiĝis la antaŭe disigitaj du germanaj respublikoj al unu lando. Tiu evento kompreneble havos grandegan influon al la estonteco de Esperanto en Germanio.

Ni havas la unikan ŝancon malfermi tute novan kaj espereble brilan ĉapitron en la historio de la germana Esperanto-movado. Pro tio ni turnas nin per komuna letero al vi, karaj geamikoj, por informi vin pri la stato de la traktadoj pri la unuiĝo de GEA kaj GDREA. Samtempe ni volas peti vin pri via persona aktiva subteno favore al la kiel eble plej harmonia kaj fruktodona okazigo de tiu historia ago.

Nia granda ŝanco ekzistas en tio, ke ni havos la eblecon, kunigi la potencialojn, spertojn kaj specifajn kapablojn de du pro historiaj kaŭzoj malsame evoluintaj landaj movadoj, kiuj povus sin bonege reciproke kompletigi.

Ni komune deklaras, ke tiu kuniĝo nur povas esti ago de samrajtaj partneroj. Unuiĝo ne estas simpla aliĝo de unu partnero al la alia. Nur tiel ni povos kunligi la potencojn de niaj movadoj, por ke la rezulto estu pli ol la simpla adicia sumo.

La prezidioj de GEA kaj GDREA intertempe bonege kunlaboradis. Ekde la 4-a de marto 1990 jam kelkfoje komisiitoj kaj prezidianoj kunvenis kaj diskutis la komunan irotan vojon. Dum la 5-a Centra Renkontiĝo de GDREA en Brandenburg unuafoje partoprenis oficiala delegacio de GEA, reciproke GDREA-delegacio unuafoje oficiale partoprenis la Germanan Esperanto-Kongreson en Freiburg. Post la ĝis nun plej intensiva interparolado komence de septembro en Erfurt ni nun havas sufiĉe klaran imagon pri la etapoj sur la vojo al la unuiĝo de niaj asocioj. Kaj ni volonte volas prezenti al vi tiujn etapojn petante viajn komentojn kaj sugestojn:

1. Ni tuj menciu unu el la plej gravaj rezultoj de niaj ĝisnunaj traktadoj: Ambaŭ prezidioj estas aparte kontentaj pri la afereca, konstruiva kaj amika etoso de niaj kunvenoj. Ni evidente havas la saman celon: fari ĉion eblan por havi fortan Esperanto-movadon en la unuigita germana ŝtato.

2. Ni samopinias pri tio, ke la esperantistaro de eks-GDR nepre konservu siajn ĝisnunajn atingojn, ligojn kaj aktivecojn. Ne permesu malstabiliĝon aŭ disfalon de grupoj kaj estraroj! Havu kuraĝon malgraŭ la malfacila tempo! Ni ja volas, ke unuiĝu du **fortaj** asocioj!

Pro tio ni nepre rekomendas, ke individuaj esperantistoj, lokaj kaj fakaj grupoj kaj la fondendaj federacilandaj asocioj restu kaj kunlaboru ĝis la unuiĝo en la nuna asocio por stabiligi la organizan strukturon en orienta Germanio.

3. Samtempe ni ĉion kuraĝigu, subtenu kaj plifaciligu, kio helpas al la reciproka konatiĝo inter la membraroj, al la ligado de rektaj kontaktoj inter individuoj, grupoj kaj landaj asocioj. La reciproka scio pri la spertoj kaj rezultoj en la agado, sed ankaŭ pri mankoj kaj malfacilaĵoj estas grava por elformadi novan senton de komuneco kaj aparteneco al **unu komuna** germana Esperanto-movado. Pri GEA vi trovis informojn en „der esperantist" 4/1990. Kaj GEA-anoj legis pri GDREA en „Esperanto aktuell" 5/1990.

4. GDREA okazigos konferencon kun delegitoj kaj membroj el sia tradicia teritorio. Tiu konferenco, okazonta fine de la kuranta jaro, havos i. a. la taskon pritrakti jenajn aferojn:

a) statuto por la transira periodo ĝis la unuiĝo,
b) la unuiĝo de ambaŭ asocioj
c) la kontrakto pri la unuiĝo
d) la projekto de nova statuto de la estonta komuna asocio.

Kompreneble la materialoj c) kaj d) estos komune ellaborataj kaj aprobitaj de ambaŭ asocioj.

5. Ni ankoraŭ ne fintraktis pri la nomo de la nova asocio. Pro kialoj de tradicio ĝi povus resti GEA. Sed ankaŭ estas bone imageble, ke ni marku la novan etapon en la historio de la germana Esperanto-movado per nova nomo de la kreota asocio.

6. La unuiĝo mem okazu en la digna kadro de la 69-a Germana Esperanto-Kongreso, kiu okazos de la 17-a ĝis 20-a de majo 1991 en Munkeno.

Jen, estimataj geamikoj kaj gekolegoj, la ĉefa skizo de la planata vojo. Ni esperas pri via aprobo kaj subteno.

Ni afable petas vin, sendi al ni viajn opiniojn, sugestojn, proponojn kaj kritikojn. Por GDREA: Esperanto-Verband im Kulturbund e.V., Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080. Por GEA: Lambertstraße 12, W-6430-Bad Hersfeld.

Sincere kaj amike viaj

D-ro Wolfgang Schwanzer
Prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (GEA)

D-ro Ronald Lötzsch
Prezidanto de Esperanto-Asocio en Kulturligo (GDREA)

La enhavo de „der esperantist" (n-roj 159–164)

Bonvolu kompletigi la superrigardon en n-ro 163 (5/1990) jene laŭ la tie menciitaj rubrikoj:

1. John Wells: Novaj ŝancoj, nova inspiro. 160, **2.** Movadaj informoj I (UEA, Landaj asocioj). 160/ D. Blanke: Vivu Rumana Esperanto-Asocio. 161/ Floras la Rumana Esperanto-movado. 161/ A. E. Künzli: Ĉu perestrojko pereigos la unuecon de sovetiaj esperantistoj? 161/ R. Fischer: Der Deutsche Esperanto-Bund stellt sich vor. 162/ Movadaj Informoj II (gazetaro). 162/ A. Bute: Timišoara ĉepinte. 163/ **3.1.** 74-a: 159/ 75-a: 164, **3.2.** 45-a: 159, **4.** Materialoj de la Akademio de Esperanto (landnomoj). 161/M. Behr: Spertoj pri terminologia laboro. 161, **5.1.** Esperanto – Fako por eksterlandanoj en la universitato Eötvos. 160/ D. Blanke: Kandidatiga disertacio pri interlingvistika temo en ĈSSR. 160/ Leonid N. Mjasnikov: kandidatiga disertacio pri frazeologio: 160/ F. Wollenberg: Doktoro Klauß pensis pri planlingvo – Nepublikigita manuskripto de sciencfikcia romano. 161/ D. Blanke: Interlinguistik in der DDR. Eine Bilanz (kun E-o-resumo). 163. **5.3.** U. Becker: Esperanto en altlernejoj – denova seminario en Bad Saarow. 162, **7.2.** Slang: La kesto por la flago. Trad. U. Becker. 161/ Kvin tradukoj de Heine-poemo. 161, **8.1.** Herman Behrmann: Recenzo-Bibliografio. Paderborn 1989. D. Blanke. 159/ Rüdiger Eichholz: Esperanta Bildvortaro, Bailieboro, 1988, D. Blanke. 159/ Rüdiger Eichholz: Esperanta Bildvortaro: fervojtema parto. H. Theurich. 159/ Mark Fettes (Red.): Jubileo. Jarcento de Esperanto. Rotterdam 1988. U. Becker. 159/ Ulrich Lins: La danĝera Lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Stuttgart 1988. Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin. Stuttgart 1988. D. Blanke. 160/ Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vol. II. Esperantismo. La Laguna 1987. D. Blanke, 161/ K. Schubert (Red.): Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages. Berlin–New York 1989. 161, **9.** Letero al la redakcio (Rezinovskij). 159/ D. Blanke: Pri esploroj de la historio de la-

borista Esperanto-movado farataj en GDR. 159/ D. Blanke: La gazeto „Völkerspiegel". 161/ A. Rátkai: Movadhistorio: Likvido de sovetiaj esperantistoj. 161, **10.** D. Blanke: GDREA en alia lando. 159/ Ernst Diedrich: Pardonu! Mi estas komunista esperantisto. 159/ D. Blanke: Reago de veterano. 159/ D. Blanke: Ĉu ni ne havis strategion? 160/ H.-J. Borgwardt: Informiloj – taskoj kaj neceso. 160/ D. Blanke: Dum 25 jaroj Esperanto en Kulturligo. Kaj la estonto: tutgermana! 162/ Intervjuo kun la prezidanto de GDREA, d-ro Ronald Lötzsch. 162/ D. Blanke: Antaŭ la naskiĝo de nova infano. 162/ F. Bues: Ŝanĝoj. 162/ D. Blanke: Pri la ŝanĝoj. 162/ D. Blanke: El la GDR-eldonoj de „Paco" 1966–1989 (bibliografio). 162/ D. Blanke: „der esperantist" 1965–1989. La plej gravaj kontribuoj kaj materialoj. 163/ D. Blanke: Ni skribu nian historion. 164/ D. Blanke: Esperanto en GDR. Historio de GDREA. Skizo. 164/ D. Blanke: Lastaj vortoj de la redaktoro. 164/ La enhavo de „der esperantist" (n-roj 159–164, = 1990). **11.1.** 159, 161, **11.2.1.** 5-a: 162, **11.4.** ITRE: 159, PoSET: 159, SEFT: 164, **11.5.** 1989: 163, **12.2.** Aldonendas: Niĝerio

D. B.

GDREA en malaperinta GDR?

Nu – la mallongigo GDREA fariĝis internacie konata. Pro tio ni konservos ĝin. Nia asocio nun havas la oficialan nomon „Esperanto-Asocio en Kulturligo r.s./ GDREA" (r.s. = registrita societo). Do germane: „Esperanto-Verband im Kulturbund e.V./ GDREA". La poŝtadreso estas senŝanĝa: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, D - O - 1080. Ŝanĝiĝis la telefonnumero al 2202991. La oficejo en Friedrichstraße 120 ne plu ekzistas. La nova oficejo nun estas identa kun la poŝtadreso, do troviĝas en la ĉefdomo de Kulturligo, sed nur ĝis decembro 1990. Ekde januaro 1991 GDREA ne plu havos propran oficejon. La poŝtadreso tamen estos plue uzebla.

Pasporta Servo

La aktuala listo de la gastigantoj de TEJO „Pasporta Servo" enhavas pli ol 900 adresojn de gastemaj esperantistoj el 53 landoj.

Ili atendas ĉiujn vojaĝemulojn parolantajn Esperanton, laŭ kondiĉoj priskribitaj en la listo, kiu estas aĉetebla ĉe ĉiuj Esperantaj libroservoj, en la orientgermana regiono i.a. ĉe Thorsten Lemke, Wetterseestraße 1, Berlin, D - O - 1100.

Aperos „Cirkulero de GDREA"

Ekde **januaro 1991** aperos modestaspekta sed riĉinforma cirkulero en Esperanto, kiun ĉiu esperantisto povas aboni rekte ĉe la redaktoro d-ro Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, Berlin, D - O - 1141.

La „Cirkulero de GDREA" aperos monate, do provizore ĝis majo. Oni povas aboni la 5 numerojn kontraŭ 6 markoj (de kiuj grandan parton formanĝos la poŝtelspezoj). La sumon sendu en poŝtmarkoj al la redaktoro. La Cirkulero informos pri ĉiuj sciindaĵoj el la vivo de GDREA kaj aparte liveros sciigojn pri la procezo de la unuiĝo de ambaŭ asocioj. Jam nun sendu viajn materialojn kaj abonojn.

Ekstervica konferenco de GDREA

La 15-an de decembro 1990 en Berlin okazos konferenco de GDREA kiu traktos kaj akceptos statuton por la organizaĵo, decidos pri la unuiĝo kun GEA kaj diskutos la projekton la nova tutgermana Esperanto-asocio. Ĉiuj membroj de GDREA, pagintaj ĝis fino de 1990 siajn kotizojn, rajtas partopreni je propraj kostoj. Interesuloj petu informilon!

Turingia Esperanto-Asocio: la unua

La 1-an de septembro 1990, en ĉeesto de la prezidantoj de GEA (d-ro Schwanzer) kaj GDREA (d-ro Lötzsch) en Erfurt fondiĝis la unua federacilanda asocio de GDREA: Turingia Esperanto-Asocio. Prezidanto elektiĝis pastoro Hans-Jürg Kelpin.

Federacilandaj asocioj formiĝas

Post la asocio en Turingio ankaŭ en aliaj federaciaj landoj de orienta Germanio fondiĝis asocioj de GDREA. La 8.9.90 por Meklenburgio/Antaŭpomerio (prezidanto Werner Pfennig), por Saksio/Anhaltio (prezidanteco ankoraŭ neklara), la 29.9.90 por Saksio (prezidanto d-ro Erich-Dieter Krause). Antaŭvideblas la fondo en Brandenburgio. La berlinanoj diskutas pri aparta solvo.

La 13-a SEFT-la nelasta

La jam tre tradicia kaj ŝatata Somera Esperantista Familia Tendaro okazis de la 18-a ĝis 25-a de aŭgusto 1990 sur la kampadejo Thomsdorf (ĉe Feldberg, lando Meklenburgio). Partoprenis 44 esperantistoj el Dagestano, GDR, Hungario, Italio, Litovio, Nederlando kaj Ukrainio. La 14-a SEFT okazos de la 10-a ĝis 17-a de aŭgusto 1991. Informojn donas Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13/0202, Neubrandenburg, D - O - 2000.

13-a ITRE

La 13-a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro okazis de 7-a ĝis 11-a de majo 1990 en Antonshöhe, Saksa Ercmontaro. Partoprenis 62 esperantistoj el ĈSFR, FRG, GDR, Hungario, Litovio, Nederlando kaj Rusio.

Al la abonintoj de „Saksa Kuriero"

Spite al nia promeso ankoraŭ aperigi la numerojn 2–6/90 de „Saksa Kuriero" ni devas konfesi, ke la duonigo de la enspezita abonkotizo kaj la monto de teknikaj malfacilaĵoj rezulte de la fina ekzistoperiodo de GDR bedaŭrinde malhelpas realigi tiun promeson. Ni petas vian komprenemon. Kompence al la elspezita abonkotizo (nun en la valoro de 2,50) ni sendos esperantlingvajn prospektojn al petintoj.

CE de GDREA

Aliĝiloj por Bergen

Kontraŭ sendo de leterafranko GDREA sendos al petantoj aliĝilon por la 76-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en 1991 en la norvega urbo Bergen.

Ulrich Becker: Nova Talento

La premion „Nova Talento" gajnis Ulrich Becker, prezidiano de GDREA, por siaj beletraĵoj senditaj por 1990 al la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA. GDREA kore gratulas

Ni skribu nian historion!

Vi legis en ĉi tiu kajero la provon, almenaŭ skize prezenti la agadon kaj ĉefajn rezultojn de GDREA. Nun ni devas alpaŝi la pli detalan priskribon de la historio de nia asocio. Tio povas okazi jene:

1. La iamaj distriktaj prezidantoj kaj aktivuloj devus konservi la dokumentojn kaj materialojn pri la historio de Esperanto en sia regiono kaj iniciati la verkadon de la distrikta historio. Simile devus fari la grupoj.
2. La fakgrupoj same havas multon por fiksi, konservi kaj priskribi.
3. Krom tio ni alvokas la plej aktivajn esperantistojn, kiuj dum la tuta 25-jara historio aŭ almenaŭ dum sufiĉe longa tempo, agadis, ke ili verku siajn personajn memorojn.

Kolekti ĉiujn dokumentojn, fotojn, aktujojn kaj aliajn materialojn. Ili estos gravaj por ĉion dokumenti.
4. Aparte mankas materialoj pri la periodo antaŭ la oficialiĝo de 1945–1965
La moderna tekniko ebligos, ke viaj manuskriptoj aperos kiel broŝuroj, bele presitaj en malalta kvanto, proprakoste aŭ per aliflanka financa helpo. Mi mem planas verki ampleksan, riĉe dokumentitan historion de Esperanto sur la teritorio de GDR. Ĉu vi pretas helpi?
Ni planas formi historian komisioneton por garantii objektivan histroriografion. Interesuloj kunlaborpretaj kontaktu *d-ron Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, Berlin, D - O - 1141*

Kongreso en Havano kun Fidel

La 75-a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 14-a ĝis 21-a de julio 1990 en Havano, Kubo. Partoprenis 1617 esperantistoj el 53 landoj, el GDR bedaŭrinde nur tri laŭ privata vojo. La ĉeftemo de la kongreso estis „Esperanto-evoluo-kultura diverseco. Aparta kulmino jam okazis dum la inaŭguro, kiam tute neatendite kaj neanoncite aperis la ŝtatĉefo de Kubo, Fidel Castro, kio tre entuziasmigis la kongresanojn. Castro ankaŭ donis akcepton. I. a. li diris tie, al la gastoj, montrante al 18-jara knabino: „Kiam vi eniris, mi vidis tiun knabineton kaj mi demandis al ŝi ‚Ĉu vi estas vjetnamino?' – kvankam mi neniam vidis vjetnaminon kun bluaj okuloj. ‚Ne', ŝi respondis, ‚mi estas filino de japanino kaj svedo'. Jen la vera signifo de Esperanto: japanino kun bluaj okuloj ... ĉar malantaŭ Esperanto estas la amo." Krome, ĉe la fino de la akcepto li diris al la prezidanto de UEA, prof. d-ro John Wells: „Mi konsideras min soldato de Esperanto". La Alta Protektanto de la kongreso, cetere, estis ne Castro sed la vicprezidanto de Kubo, Carlos Rafael Rodríguez. La junulara kongreso okazis en la fama Playa Girón („La golfo de la porkoj"). La kubaj esperantistoj vere multege atingis per tiuj kongresoj, kiuj donos fortegan antaŭenpuŝon al la movado sur la bela insulo de Karibio. El la tiam ankoraŭa GDR partoprenis Detlef Hoffmann kun sia edzino kaj Andreas Jakob el Halle.

VHS-Videoleihdienst – Filme in und über Esperanto
Gegen Einsendung von 3 DM in Briefmarken senden wir Ihnen gern unsere Videoleihliste zu. Das Programm wird ständig erweitert; bereits über 50 Titel! Ideal für Sie daheim, für den Esperanto-Schulunterricht, für Ihre Esperanto-Gruppe, für Ihr Esperanto-Treffen, für Ihre Kurse usw.
Esperanto-Gesellschaft Südharz, Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 8, D - W - 3420 Herzberg/Harz; Tel. (abends) 05521/1363.

Die optimale Esperanto-Zeitschrift aus China
Jahresabonnement 32 DM, zwei Jahre 52 DM, drei Jahre nur 72 DM. Jedes Heft über 70 Seiten, teilweise prächtig farbig. Gratisexemplare und Bücherliste gegen Rückporto: Ursula Zilvar, Grubenhagenstr. 8, D - W - 3420 Herzberg/Harz

Japana grupo en GDR
De la 4-a ĝis 7-a de aŭgusto 1990 grupo de 17 japanaj esperantistoj restadis en GDR. Temas pri MEM-grupo sub gvido de Kurita Kimiaki, prezidanto de la japana MEM-sekcio. La 4-an de aŭgusto la grupo konatiĝis kun Orienta Berlino kaj kolektis subskribojn kontraŭ nukleaj armiloj ĉe la Brandenburga Pordego. Vespere okazis diskutintensa renkontiĝo kun esperantistoj el orienta kaj okcidenta Berlino. La 5-an de aŭgusto la japanoj vizitis la Koncentrejon Sachsenhausen. La 6-an ili estis gviditaj kaj akceptitaj de esperantistoj el Potsdam. La 7-an de aŭgusto ili daŭrigis sian vojaĝon al Hungario kaj Bulgario.

Unua kongreso de Rumana Esperanto-Asocio
Ĝi okazis de la 13-a ĝis 15-a de julio 1990 en la granda Amfiteatro de la Universitato de Timišoara. Partoprenis ĉ. 300 rumanaj esperantistoj. La kongreso reelektis prof. d-ron F. Bociort prezidanto de REA. La sidejo de REA transiris al Timišoara.

Kiu interesiĝas pri junulara faka laboro lingvistika?
Dum du semestroj mi studas lingvistikon en Tübingen. Mi tre ŝatus informiĝi ankaŭ pri lingvistikaj aktivecoj en kaj pri Esperanto kaj povas imagi al mi regulan informinterŝanĝon pri lingvistikaj temoj kaj laborajoj inter la esperantistoj lingvistoj de GEJ kaj LEJ. Se vi havas tiajn informojn aŭ se vi, same kiel mi, ŝatus havi ilin, bv. kontaktiĝi kun mi. *Manfred Sailer*: Solitudestr. 176, 7000 Stuttgart 31; 0711/882736, aŭ Allianz-Wohnheim, Zi. 36, Poststr. 7, 7400 Tübingen.
(GEJ = Germana Esperanto-Junularo de FRG, LEJ = La Esperanto-Junularo de GDR)

GDREA forlasos UEA
Ekde 1976 GDREA estas kolektiva membro de UEA kaj donis sian certe neniam sufiĉan kontribuon al la monda organizajo. La asocio kunlaboris kun kaj en UEA, laŭ la donitaj eblecoj kaj la kadro, kiun metis la ŝtato. Nun, post la unuiĝo de ambaŭ germanaj ŝtatoj, ekestiĝis nova situacio. En unu lando, almenaŭ por kelkaj monatoj, agadas du landaj asocioj. Laŭ la statuto UEA nur povas havi unu landan asocion el unu lando. Ĉar GDR malaperis, estas logike, ke ne GEA sed GDREA forlasos UEA. Post la unuiĝo de GDREA kaj GEA la situacio denove respondas al la statuto. Do, ekde 1991 GDREA ne plu estos kolektiva membro de UEA. Tamen, la membroj de GDREA kompreneble povas fariĝi individuaj membroj de UEA. Tiun eblecon en la pasinteco fakte tre malfaciligis certa leĝo de GDR, laŭ kiu individua membreco en internacia neregistara organizajo nur eblis kun la aprobo de la koncerna ministerio. Nu – GDREA fermis siatempe ambaŭ okulojn kaj „tute ne sciis", ke multaj ĝiaj membroj ja estis individuaj membroj de UEA kaj neniam petintaj iun ajn aprobon. La sama validas por la delegitoj en la jarlibro de UEA. Feliĉe tiuj burokrataj bariloj falis. Kaj ĉiu povas agi laŭplaĉe. Interesuloj pri UEA-membreco kontaktu Rolf Beau, Jacobstraße 9, D - O - 7010 Leipzig.

Libro pri Ĉernobil
La moskva eldonejo „Progreso", kiu lastatempe publikigis jam diversajn librojn en Esperanto, jus aperigis la faman „dokumentan novelon" „Ĉernobil" de Jurij Ŝĉerbak. La 400-paĝa A-6-formata libro priskribas la la mondskuan havarion de la atomenergia centralo Ĉernobil en Ukrainio. La libro estas broŝurita kaj entenas kelkajn fotojn.

Dulanda renkontiĝo en Hof
De la 19-a ĝi 21-a de oktobor 1990 en Hof (Bavario) okazis dulanda esperantista renkontiĝo. Ĝi estas origine planita kiel trilanda (ĈSFR, FGR, GDR) sed fariĝis dulanda, ĉar, kiel konate, survoje malaperis unu lando. Partoprenis pli ol 160 esperantistoj, inter ili ĉ. 40 el la eksa GDR kaj eble 20–30 el

ĈSFR (aparte Slovakio). Flanke de GDREA la aranĝon partoprenis oficiala delegacio *(d-roj Lötzsch* kaj *Blanke)*, kiuj daŭrigis la interparolojn kun prezidianoj de GEA pri la estonta unuiĝo de ambaŭ asocioj. Aparte interesa estis la ĉefprelego de *d-ro Werner Bormann* (Hamburg), vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj prezidanto de la Germana Esperanto-Instituto, pri „Esperanto en ŝanĝiĝinta mondo". Kadre de la programo kunsidis aktivuloj de la „Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj" (aliĝu ĉe *Stefanie Tucker*, Alatseestr. 14, D - W - 8900 Augsburg) kaj de la Germana Esperanto-Instituto. Al la programo ankaŭ apartenis publika debato kun reprezentantoj de la Slovakia Esperanto-Asocio *(Milan Zvara)*, GEA *(Rainer Heckhausen)* kaj GDREA *(Detlev Blanke)*. Aparta arta ĝuo estis la plenvespera prezento de la teatraĵo de Tennessee Williams „La kato sur la varma ladotegmento", kiun en bonega Esperanto kaj kun aktora talento prezentis la juna okcidentgermana amatora grupo „Kia koincido".

Fervojistoj en Leinefeld

La Fakgrupo de la Fervojistaj Esperantistoj de GDREA okazigis sian ĉiujaran fakkunvenon ĉifoje en Leinefelde. Kolektiĝis pli ol 30 fakuloj, inter ili ne nur el la eksa GDR sed ankaŭ gastoj el Belgio, ĈSFR, Danio, Hungario kaj Pollando. Inter la partoprenintoj ankaŭ estis la iama prezidanto de IFEF, s-ro *Gießner*. La ĉeftemo estis „tuneloj",traktita ne nur per fakaj prelegoj sed ankaŭ per ekskurso fervoja t:a tuneloj. Reelektiĝis la kapabla gvidantaro, al kiu apartenas *d-ro Heinz Hoffmann, Horst Jasmann, Horst Theurich* kaj *Achim Meinel* (kiel prezidanto). La aranĝon partoprenis la sekretario de GDREA.

Brandenburgia Esperanto-Asocio

Dank' al la bonega preparo flanke de *Rainer Pauli* la 27-an de oktobro 1990 en Potsdam fondiĝis kiel kvina federacilanda asocio en la eksa GDR la Brandenburgia Esperanto-Asocio. La partoprenantoj diskutis statuton kaj elektis estraron, kvankam la ofico de prezidanto ankoraŭ vakas. Partoprenis la sekretario de GDREA.

Dankon al la iamaj distriktestroj!

Malaperis GDR. Malaperis la administra strukturo laŭ distriktoj. Reaperis la federaciaj landoj Brandenburgio, Meklenburgio/Antaŭpomerio, Saksio, Saksio-Anhaltio, Turingio kaj Berlino. Ĉar en tiuj landoj ankaŭ fondiĝis Esperanto-asocioj, la iamaj distriktaj landaj organizaĵoj de GDREA eniris tiujn novajn asociojn. La ĝisnunaj prezidantoj de la distriktaj estraroj de GDREA aktive helpis tiun evoluon sed ja perdis siajn oficojn. Pro tio estas dece kaj merite publike danki al ĉiuj, kiuj plenumis tiun ne ĉiam facilan oficon: *Hans-Peter Bartos* (Halle), *Rudolf Burmeister* (Karl-Marx-Stadt), *Kurt Güse* (Schwerin), *Uwe Hübner* (Rostock, antaŭe kaj pli aktive: *Werner Plate), Hans-Jürg Kelpin* (Erfurt), *Christel Kraus* (Cottbus), *Helmut Krone* (Berlin orienta), *d-ro sc. Günther Minkwitz* (Dresden), *Rainer Pauli* (Potsdam), *Werner Pfennig* (Neubrandenburg), *d-ro Hans Rogazewski* (Suhl), *Ronald Schindler* (Frankfurt/O) kaj *Sabine Schulze* (Leipzig). En krampoj aperis la iamaj distriktoj. En du distriktoj na plu funkciis distrikta estraro, tamen oni danku al *Edith Plümecke* (Magdeburg), *Karl Raabe* kaj *Gerd Luther* (Gera). Al la danko pro la farita laboro ligiĝas la espero, ke ĉiuj restu fidelaj al GDREA (ĝis ĝia malapero) kaj aktivadu en la baldaŭ unueca germana Esperanto-movado.

CE de GDREA

5-a eldono de la lernolibro

Antaŭ nelonge aperis la 5-a eldono de la lernolibro de *Till Dahlenburg* kaj *Peter Liebig*. Ĝi estas havebla ĉe GDREA kontraŭ 9 markoj kaj afranko.

Koresponda kurso ankaŭ estonte

Oni senhezite daŭrigu la varbadon por la koresponda kurso. Ĝi funkcios ankaŭ estonte. Ĉiuj interesuloj rekte kontaktu la gvidanton de la kurso, *Ulrich Becker* (Küstriner Straße 3, Berlin, D-O-1092)

Universitataj prelegoj

Por la vintra semestro 1990/91 la Humboldt-Universitato ankaŭ enhavas en sia programo prelegserion pri planlingvoj (kun aparta konsidero de Esperanto), kiun prezentas *d-ro Detlev Blanke*, honoraria docento pri interlingvistiko en la universitato.

„Kennen Sie Esperanto?"

Jen la titoldemando de ĵus aperinta informa faldfolio pri Esperanto, kiun eldonis GDREA. Sur kvar A-5-formataj paĝoj ĝi prezentas bazajn faktojn pri la movado, la UNESKO-rezolucion de 1985, skizon de la gramatiko, literaturindikojn kaj kelkajn germanajn proverbojn kun esperantaj ekvivalentoj. Mendu ĉe GDREA (Esperanto-Verband im Kulturbund e.V./ GDREA Otto-Nuschke-Str. 1, D - O - 1080 Berlin) Ekzmplero kostas 5 pfenigojn.

Estona Radio en Esperanto

Jen la indikoj pri la Esperanto-elsendoj de Estona Radio:
ĵaŭde: 22,25 h (mezeŭropa tempo), 290 m (1035 kHz) aŭ 50,6 m (5925 kHz);
dimanĉe (ripeto): 10,20 h, samaj ondolongoj.
Reagu al: Estona Radio, Esperanto-redakcio, SU-200100 Tallinn, Estonio.

Kastora Klubo

Kastora Klubo estas Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco al kiu apartenas infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj el 60 landoj. Kastora Klubo helpas trovi korespondamikojn en aliaj landoj. Sufiĉas sendi al la klubo informojn pri familia kaj persona nomoj, naskiĝdato, sekso kaj interesiĝoj.
Al Esperanto-instruantoj, kiuj kunlaboras kun la klubo Kastora Klubo sendas senpage la kluban bultenon, kiu krom la informojn pri kluba vivo enhavas facilajn legaĵojn, versaĵetojn, kanzonetojn. Multaj E-instruantoj uzas ilin kiel instruhelpiloj. Por pli detalaj informoj skribu al la klubo: Kastora Klubo, Pu*ł*awska 3–11, 02–515 Varsovio, Pollando.

El la ĉina medicinista Esperanto-movado

La Ĉina Medicina Esperanto-Societo, unika tutlanda faka Esperanto-organizaĵo en Ĉinio, klopodas akiri sian oficialigon. Por tiu ĉi celo dum laborkunsido de ĈMES dum majo 1990 elektiĝis provizora estraro kaj estis starigitaj planoj por estonta agado: akupunkturaj kursoj, interŝanĝo de informoj, perado de servoj. Por povi realigi tion, ĈMES bezonas la subtenon de la internacia medicinistaro kaj de koncernaj Esperanto-organizaĵoj: Kontaktu s-ron PENG Jianjun, Chezhan Xincun 440-1, Xujiapeng, Wuchang, TJ-430062 Wuhan, Ĉinio.

Neuerscheinung

Konversationsbuch Deutsch-Esperanto
Konversacia libro Germana-Esperanto

Von Detlev Blanke und Till Dahlenburg
Etwa 240 Seiten
108 mm × 180 mm
Broschur etwa 12,80 DM (zuzügl. MwSt)
ISBN 3-324-00508-6

In diesem Konversationsbuch werden vor allem grundlegende Satzstrukturen und Mustersätze mit austauschbaren Bestandteilen geboten, um dem Benutzer eine gewisse Variabilität des Ausdrucks zu ermöglichen. Einige Besonderheiten im Aufbau dieses Bandes ergeben sich aus dem besonderen Charakter des Esperanto als Plansprache gegenüber den natürlichen Sprachen mit ihren historisch gewachsenen Sprachräumen. Hier soll in erster Linie deutschen Esperantisten beim Besuch ausländischer, Esperanto sprechender Gäste eine Grundlage geboten werden. Formuliert werden nur die Aussagen des Gastgebers bzw. Betreuers, so daß dem konkreten Gesprächsablauf nicht vorgegriffen wird.

Eine Hilfe sind Übersichten zu Aussprache und Betonung, Affix- und Wortendungstabellen sowie eine Aufstellung von Tabellenwörtern zur Wortbildung des Esperanto. Den Band beschließen Literaturhinweise und alphabetische Sachregister in Esperanto und Deutsch.

Zu den Autoren

Dr. sc. Detlev Blanke, Sekretär des Esperanto-Verbandes im Kulturbund e. V., ist mit zahlreichen Publikationen zum Esperanto und zur Plansprachenproblematik hervorgetreten. Er ist Honorardozent für Interlinguistik an der Humboldt-Universität Berlin.
Dr. Till Dahlenburg ist Vorsitzender der Kommission für Methodik des Esperanto-Unterrichts des Esperanto-Verbandes und Mitautor des in unserem Verlag bereits erschienenen Taschenlehrbuches Esperanto.

VERLAG ENZYKLOPÄDIE LEIPZIG
Gerichtsweg 26 · Postfach 130 · Leipzig · D-0-7010

Bereits für 1989 wurde obiges Buch als Neuerscheinung angekündigt. Anfang November 1990 war es noch nicht erschienen. Wenn Sie mithelfen wollen, daß dieses Buch erscheint, bestellen Sie für sich und Ihre Gruppe direkt beim Verlag!

Sonkaseda serio de malgranda eldonkvanto

La E-fako de LINGVO-Studio produktis ĝis nun 5 esperantajn kasedojn, ĉefe kiel sonmaterialaj helpiloj al diversaj porhungaraj E-lernolibroj. Por nehungarlingvanoj ĝis nun estis proponita nur la jam sukcesa, internacie rekonata kanto-kasedo de Dinnyes: „Al venko!"

Por ke valoraj registraĵoj de nur 1-foje sonintaj E-koncertoj ne kuŝu en la tirkesto, estas decidite eldoni ilin en serio de malgranda eldonkvanto, kun malalta prezo.

– Jame vekis internacian eĥon la 1-a numero de tiu serio, la registraĵo de la profesiista koncerto dum la Budapeŝta Printempa Festivalo, la E-lingva oratorio: MESIO de Händel.

– En la aranĝaĵo IJS-89 la unuan fojon elpaŝis eksterlande la jam famiĝinta sovetia kantista paro Ĵomart & Nataŝa, kies fotoj multfoje aperis en internaciaj E-revuoj (Esperanto, TEJO-Tutmonde, Koncize ktp.). Tial, ke iliaj mildaj, lirikaj kantoj ravegis la ĉeestintojn, ni certas, ke estos ĝojige aŭskulti, kaj reaŭskulti ilian koncerton, kiel 2-a numero de la serio de malgranda eldonkvanto.

– La ŝatantoj de korusaj kantoj verŝajne volonte aŭskultos la registraĵon de la Budapeŝta UK, la tiean Korusan Festivalon! (N-ro 3 de la serio).

La esperanta muzika kulturo do ne stagnas. Ni, membroj de LINGVO-STUDIO, ĝojas, se per nia laboro ni povis eĉ iomete kontribui al la kultura vivo de nia E-komunumo

Szilvàsi Làszló

Baltia Esperanto-Kongreso

Anstataŭ organizi pluan aranĝon en la vico de la ĝisnunaj Esperanto-tendaroj aktivuloj el Latvio, Litovio kaj Estonio okazigis la unuan Baltian Esperanto-kongreson de la 10-a ĝis 19-a de julio 1990 en Jelgava. Partoprenis 435 personoj, inter ili el aliaj sovetiaj respublikoj kaj el Brazilo, Britujo, FRG, Finnlando, GDR, Hungario, Norvegio kaj Pollando. La kongresa temo estis la rolo de Esperanto en la protekto de lingva kaj kultura diverseco de malmultenombraj nacioj.

Korespondu kun amikoj!

Rumanio

El la urbo 2400 Sibiu:

– Roxana Stoenescu, Str. Lenin Nr. 6
– Nicolae-Ciprian Tarcea, Calea Surii Miciu Nr. 1
– Ramona Todîrcea, Aleea Rusciorului Bl. 67, Sc. A, Ap. 11
– Felicia Vadas, Aleea Steaza Nr. 3, Bl. 110, Ap. 14
– Florentina-Coralia Vàcar, Str. Rahovei Bl. 20, Sc. A, Ap. 2
– Iulia Vidrighin, Str. Avrig Nr. 1
– Rodica-Dida Vinersar, Str. Tiglarilor, Bl. 21, Ap. 47
– Mádálina Sibsan, 10-jara, Manejulni Nr. 4, Ap. 2

El la urbeto 2437 Cisnadie

– Loredana Catana, Str. Piata Noua, Bl. F Sc. A, Ap. 5
– Alina Luca, Str. Stejarului, Bl. 19, Sc. A, Ap. 9
– Monica Opris, Str. Stejarului Bl. 25, Sc. B. Ap. 29
– Daniela-Maria Talos, Str. Proletarilor Nr. 9

El la urbeto 2459 Ocna Sibiului

– Monica-Lacrima Gurzău, Str. Báilor Nr. 4, Bl. 2, Ap. 9
– Bianca Tronco, Str. Báilor Nr. 2, Bl. 4, Ap. 10

El la urbo 3130 Dumbráveni, Jud. Sibiu

– Mihai Boca, 15 j., lernanto, str. Zorilor Nr. 26

El la urbo 1650 Carantebes, Jud. Caras-Severin

– Adriana Boca, 17 j., lernantino, str. Scinteŭ Noi, Bl. 59, Ap. 8

Novaj geesperantistoj el Rumanio, kiuj dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

El la urbo 2400 Sibiu

– Mariana Ćîrstea, 24 j., laboristino, str. Gorăslău, Bl. T16, Ap. 22
– Daniela Dordea, 37 j. inĝ., Str. Rusciorului, Bl. 24
– Ioana Pîrvu, 31 j., inĝ., Kv. Strand, Str. Bîrsei, Bl. 36A, Ap. 67
– Despina Cigmàianu, 24 j., ekonomikistino, Str. Alexandru Vlahută Nr. 6
– Niocolae Albu, 31 j. inĝ. Str. Eroilor Nr. 9
– Gabriela Isailă, 22 j. studentino, Str. Lenin Nr. 3
– Cătălin Grigore, 17 j., lernantino, Str. Vasile Aaron, Bl. 24, Ap. 3
– Sorin Anghel, 17 j. lernanto, Bulevardul Victoriei Nr. 72
– Madalina Pitu, 17 j. lernantino, Str. Vasile Cirlova Nr. 21, Ap. 41
– Silvia Rada, 19 j., instruistino, Str. Amnas, Nr. 2
– Viorica Filip, 37 j. matematikistino, Str. Rusciorului, Bl. 18, Ap. 6.
– Simona Tosa, 26 j., inĝ., Str. Bîrsei Nr. 6, Ap. 32
– Daniela Răspop, 23 j., oficistino, Str. Gîrlei Nr. 8
– Maria Trîmbitas, 65 j. kuracistino, Bulevardúl Mihai Viteazul, Bl. 25
– Ileana Popa, 31 j. tajpistino, Str. Nouă, Nr. 40
– Lucian Cazacu, 52 j. medicina asistanto, Str. Uzinei, Bl. 15, Ap. 31
– Nicolae Rodeanu, 50 j., aktoro, Str. 1 Mai, Nr. 18
– Camelia Pentelescu, 32 j. ĵurnalistino, Str. Otelarilor Nr. 6
– Dorin Gogîlea, 46 j., ĵurnalisto, Calea Surii Mari Nr. 7
– Livia Solomon, 70 j., profesorino, Str. General Balan Nr. 1
– Marcela Nitu, 29 j. oficistino, Str. Strandului Bl. 6, Ap. 21
– Monica Albu, 23 j., oficistino, Str. Dîrstelor Nr. 14
– Marius Chitu, 26 j., teknikisto, Str. Rotarilor Nr. 25
– Marius Munteanu, 56 j., inĝ., Aleea Fratii Buzesti Nr. 3, ap. 17
– Liliana Dediu, 28 j., oficistino, Str. Centrumvirilor Nr. 6
– Ioan Stanulet, 37 j., medicina teknikisto, Str. Tribunei Nr. 15
– Maria Maraloiu, 29 j., oficistino, Str. Urlea Nr. 31
– Burcura Vasilescu, 56 j., oficistino, Str. Rahovei Nr. 35, Ap. 31
– Serĉataj estas Germanaj E.-oj. Skribu al Haraga Loan, Micro 3, Bloc A3, Ap. 38, 5100-Buzău.

Soveta Unio

– Studento dez. kor. kun geesp. el GDR pri literaturo, tekniko, naturo, lingvoj, historio: Vladimir Vinogradov, 700167 Tashkent, ul. Zelenaja 38.
– Studentino, 17 j., dez. kor. p. ĉ. t.; kol. pm: Elena Masljonok, str. Mariupolskaja 16–20, 236006 Kaliningrad.
  Ludmila Sjerjebrjennikova, 610027 Kirov, str. „Karl Marks" 167 kv. 37: 30 j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.
– Tatjana Zavjalova, 163 009 Archangelsk, ul. Pervomajskaja 9, kv. 5, 24 j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.; kol. bk, pm, revuojn.
– Komencantino, 19 j., dez. kor. tutmonde kun gejunuloj p. ĉ. t.: Lena Polinskaja, 164505 Severodvinsk, Archangelsekaja obl., ul. Industrialnaja 62–323
– Komencantino, 14 j., dez. kor. kun gejunuloj p. ĉ. t., kol. kalendaretojn: Lena Zapajeva, 163009 Archangelsk, ul. Pervomajskaja 1, kv. 1
– Komencantino, 18 j., dez. kor. tutmonde: Nekrašaite Ĵivile, 235000 Jonava, Litovio, Chemiku 55 b. 9
– E-rondeto (20–35-jaruloj) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: E-klubo „Bonvenon", 220050 Minsk-50, pk. 182

Korespondeziroj

Alĝerio

– 23-jara inĝeniero dez. kor. pri E.-movado en Germanio kun pacemaj amikoj. H. Schaurar, Sonnenweg 20, Guendouze 06251, W. Bejaia, Alĝerio,

Bulgario

– Peter Georgiev, P.K. 143, BG-1404 Sofio, serĉas kontakton kun esperantistoj el Germanio (ankaŭ familioj) interesiĝas pri turismo, fotografio, kolektas pm, bk.

Ĉeĥoslovakio

– Kvar f-inoj, komencantinoj, 17 kaj 19 j., dez. kor. tutmonde p.ĉ.T.: Skribu al Drahomira Kŭrková, SNP 581, 50003 Hradec Králové, ĈSFR

Ĉinio

– s-ro Peng Jianjun, Chezhan Xincun 44-1, Xujiapeng, Wuchang, TJ-430062, Ĉinio, havas por interesuloj memorigajn monerojn pri la 11-a Azio-ludoj (sportkunveno)

GDR

– Industria komercistino, 26 j., komenc., dez. kor. tutmonde pri muziko, lingvoj, vojaĝoj, politiko, sporto, ekonomio: Simona Johannsen, Trauckestr. 11, Leipzig, 7050,
– F-ino Reschke (26 j.) dez. kor. kun ĉ. l. pri muziko, literaturo, historio ktp. adreso: Simone Reschke, Werderstr. 11, Wittstock (Dosse), 1930
– S-ro Ernst-Adolf Kiesel (60 j.) dez. kor. kun samaĝaj geamikoj e ĉ. landoj: W.-Kaczmarek-Str. 3, Hettstedt, 4270
– Fraŭlo, 23 j., dez. kor. kun ĉ. landoj pri literaturo, muziko, naturo. Adreso: Klaus Liebig, Weststr. 5, Meuselwitz, 7404
– Ingrid Schmidt, 50 j., dez. kor. p.ĉ.t. tutmonde. Adreso: Lessingstr. 15, Thale/Harz, 4308.
– Heike Roscher (23 j.) dez. kor. kun ĉ. landoj pri bestoj, muziko, literaturo. Adreso: PF 13/28, Bernstadt, 8703,

Hungario

– 17-jara lernantino dez. kor. p.ĉ.t. Nagy Agnes, Györi bapu 156, Miskolc, 3525.

Irano

– Rezo naĝati dez. kor. kun germanlingvuloj p.ĉ.t. pri literaturo, arto, vojaĝoj. Post box 13355-158 Tehran
– Mi serĉas leteramikojn! Mohammed Reza, P.O. Box 51335-4859, Tabriz, 20 jara studento, vol. kor. kun junaj esperantistoj. Bv. sendi foton.

Italio

– Kom. dez. kor. kun samideanoj en Berlin pri sporto, arto, politiko (ne pri partipolitiko), humanismo. Marco Pnesicce, via Capouilla si Sopra 1, 37031 Illasi (UR)

Kolombio

– S-ro Javier Andrés Ruiz, komencanto, dez. kor p. ĉ. t. adreso: Ap. Aéreo 8792 Bogotá

Rumanio

– Kuraisto serĉas kunlaborantojn por kompili poliglotan fakvortaron: Esperante, germane, angle, rumane, hungare, latine: d-ro Ĉaba Bige, Jud. Mureş, R-3280, Sîng de Padure.
– Internacia koresponda klubo helpas al vi trovi korespondanton kaj reciproka gastado en Rumanio. adreso: Lugoj 1800, Box 75.
– Novaj geesperantistoj el Rumanio, kiuj dez. kor. kun ĉ. landoj p.ĉ.t.:
  El la urbo 2400 Sibu
– Iuliana Aldea, Calea Dumbrăvii Bl. 17, Sc. D, Et. III, Ap. 44
– Anamaria Bistriceanu, kv. Vasile Aaron Str: Steflesti Bl. 9, Ap. 16
– Cătălina Dumitrescu, Bulevardul Victoriei Nr. 21.
– Loredana Gîndilą Str. Lutului Nr. 54
– Cristina-Ramona Pop, Str. Tribunei Nr. 33
– Mihaela Sălcudean, Valea Aurie, Str. Crint Nr. 5, Bl. 14, Ap. 27
– Elena Popa, 60 j., oficistino, Str. Eroilor Nr. 14
– Ana-Maria Gavrilă, 64 j., oficistino, Str. Eroilor 13,
– Nicoleta Răileanu, 32 j., profesorino, str. Alpinismuli
– Titus Frum, 60 j., oficisto, Str. Tiglarilor 43
– Ion Muntean, 60 j., teknikisto, str. Copernic 5 El la urbo 2437 Cisnădie
– Traian Pasca, 35 j., teknikisto, Str. Viilor Nr. 19
– Tania Corpade, 32 j., oficistino, Str. Fundătura Viilor Nr. 11
– Maria Ciontea, 30 j., oficistino, Str. Teilor Nr. 4

Tanzanio

– 32-jara s-ro dez. kor. pri muziko, ideaj interŝanĝoj. Sylivester N. Nyinyimbe, P. O. Box 147, Bunda

Togo

– Komencanto ŝatas kontakti geamikojn tutmonde: Gbote Ayao, BP 2078, Lomé-Togo

Koreujo

– 25 anoj de E.-klubo de Kukĝe Universitato atendas leterojn. Skribu al E.-klubo de Kukĝe Universitato, San 16-1 Tŏngleung-kdong, Sŏngbuk-gu 136-104, Seulo.

*

„der esperantist" malaperos

Lastaj vortoj de la redaktoro

Estimataj legantoj, pro la unuiĝo de ambaŭ germanaj ŝtatoj kaj la el tio rezultonta unuiĝo de ambaŭ germanaj Esperanto-asocioj, finance ne plu eblas daŭrigi la eldonadon de nia „der esperantist". Ni dankas al ĉiuj legantoj en-kaj eksterlande pro ilia fideleco, kiun ili konservis al la modesta revueto. Kun ĉi tiu numero aperis entute 164 kajeroj kaj unu germanlingva ekstra numero. Tio sume estas 3960 paĝoj. En „de" 5/1990 (163) ni donis superrigardon pri la enhavo kaj menciis diversajn problemojn ligitajn al la revueto. Mi tre volonte faris mian laboron, certe ne perfekte. Mi dankas al vi pro via kompreno, subteno kaj kunlaboro. Ni havos novan estontecon. Ni vidos, ĉu certaj trajtoj de „de" estas daŭrigindaj kaj eble aperigeblaj en aliaj publicaĵoj. Finiĝis kvaronjarcento de Esperanto-movado en GDR. Malaperis GDR sed ne la esperantistaro en la regiono de la eksŝtato.
Ni daŭrigu en nova tutgermana asocio. Esperanto havos perspektivon!

Via Detlev Blanke

Herausgeber: Kulturbund e.V.
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080,
Fernruf 2202991
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke
Redaktionskommission: Manfred Arnold, Ulrich, Becker,
Dr. Ronald Lötzsch, Detlef Kraus, Werner Pfennig
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr, Preis pro Einzelheft 2 DM
Druck: TASTOMAT GmbH · Eggersdorf, 1275
Artikel-Nr. (EDV) 79283216